

revuo

esperanto

februaro 1964

57-a jaro

n-ro 699 (2)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



ESPERANTO

revuo internacia

- enhavo** 21 La universaleco kaj demokrateco de UEA (I. L.)
22 La kostoj de samtempa tradukado (Lewin)
23 La "Suda Konuso" vokas vin (Sonnenfeld)
25 Argentino (Lingua)
26 "Tri arboj" (Mistral/Pfeffer)
27 El "Martín Fierro" (Hernández/Sonnenfeld)
28 CED
29 La 7-a Universala Ekspozicio
30 Novaj libroj
32 Letero
Ricevitaj eldonaĵoj
33 Mallongaj novaĵoj
34 49-a Universala Kongreso, Hago, 1964
Internacia Ekzameno
9-a Infana Kongreseto, Overschie, 1964
36 La Juna Vivo
37 Oficiala Informilo
Radio
Kalendaro
38 La Internaciaj Konkursoj 1963 (rezulto)
Aviadila karavano al Tokio

kovrilo Fentrinda Nederlando — kongreslando de la 49-a UK

- fotoj** Kovrilo: ANVV (Generala Nederlanda Turist-Oficejo)
26 Gonzalez Saameño
30 "La Praktiko"
35 Cas Oorthuys

Fondinto: H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono: (010) 3 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMADRESO:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, Tel. (010) 5 66 45.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Jara abono (1964): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri kongresoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odýnca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario, Kystvej 10 2 th., Aabenraa, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7 Zürich 6/57, Svislando.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

esperanto
februaro
1964

Taŭga organiza aparato estas necesa por efika disvastigo de kiu ajn ideo, des pli de tiel nova kaj multfaceta, kiel tiu de komuna neŭtrala lingvo por interpopolaj rilatoj. Ekde la komenco stariĝis aro da problemoj: diskonigo de la lingvo, favorigo de la publika opinio, instigado al lernado, publikigado de lernolibroj kaj vortaroj, eldonado de literaturaj verkoj, revuoj kaj gazetoj, kreo de ĉiaspecaj praktikaj servoj. Ĉiuj ĉi taskoj kaj multaj aliaj pli aŭ malpli gravaj estas grupigeblaj en tri ĉefajn agadbranĉojn: informado, instruado, praktikaj aplikoj.

Oni frue rimarkis, ke por realigi la idealon de unusola lingvo por internacia komunikado oni devas iamaniere kunigi la fortojn kaj harmoniigi la klopodojn, sed oni ankaŭ komprenis, ke pro la etnika, lingva kaj politika strukturo de la mondo, kiel ankaŭ pro psikologiaj faktoroj kaj praktikaj konsideroj, kelkaj el la menciitaj laboroj povas esti plej sukcese plenumitaj sur loka, regiona aŭ landa niveloj, dum aliaj postulas internacian kunagadon.

La nuna strukturo de U.E.A., laŭ la Statuto laste reviziita en decembro de 1956, baziĝas sur tri fundamentaj principoj, kiuj respondas ĝis la plej alta grado al tiuj bezonoj. La principo nacia aŭ teritoria, laŭ kiu estas organizitaj niaj landaj asocioj, regionaj kaj lokaj societoj, esprimiĝas en la ebleco por ĉiu landa organizaĵo aliĝi al U.E.A. per membrigo de sia tuta anaro je tre malalta kotizo por ĉiu unuopa membro. Laŭ la principo de universaleco, ĉiu persono parolanta la Internacian Lingvon, senkonsidere al siaj nacieco aŭ ŝtataneco, povas rekte aliĝi al U.E.A. kiel individua membro kaj ĝui specialajn avantaĝojn laŭ la diversaj kategorioj. Fine, la principo de internacieco ebligas al diversaj internaciaj fakaj Esperanto-organizaĵoj ĉu aliĝi al U.E.A. laŭ la samaj kondiĉoj kiel la landaj asocioj, ĉu ligiĝi al ĝi per kontraktoj pri komuna agado, interŝanĝo de servoj ktp. Eĉ pli, ankaŭ ne-neŭtralaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj kaj landaj fakaj asocioj povas kontrakti kunlaboradon kaj interŝanĝon de servoj kun U.E.A. laŭ difinitaj kondiĉoj, kiujn preskribas la Art. 16 kaj 17 de la Statuto. Diference de diversaj ekskluzivaj organizaĵoj, U.E.A., kiu mem estas la bastiono de agado por Esperanto en la mondo kaj la ĉefa organizanto de internaciaj servoj per Esperanto, vaste malfermas la pordojn al ĉiuj, kiuj en kiu ajn senco kaj en kiu ajn loko laboras por la Internacia Lingvo aŭ utiligas ĝin por praktikaj celoj. La kotizoj de U.E.A., ekde la vere minimuma de 0,50 ned. gld (proks. afranko de letero al eksterlando) por ĉiu asocia membro ĝis la plej alta de 200 gld jare por patronoj, montras pli ol klare, ke la pordoj estas malfermitaj ne nur por esperantistoj pli bonstataj, sed ankaŭ por tiuj kun la plej modestaj enspezoj.

Tamen, universaleco sen demokrateco havus

nenian valoron. En U.E.A. la demokrateco esprimiĝas ne nur en la principo de la Statuto, ke la respekto de la Homaj Rajtoj estas esenca kondiĉo por ĝia laboro, sed interalie, ankaŭ en la konsisto de ĝiaj organoj kaj en la maniero, laŭ kiu ili estas elektataj kaj funkcias.

La Komitato de U.E.A. reflektas la strukturon de la Asocio. Ĝi konsistas el komitatanoj A, kiujn elektas la aliĝintaj landaj kaj fakaj organizaĵoj. La komitatanoj B, kiujn elektas la ĉefdelegitoj kaj delegitoj, reprezentas la individuan membraron. Fine, la komitatanoj A kaj B kune povas alelekti la tiel nomatajn komitatanojn C ĝis kvarono de sia propra nombro por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj aparte kompetentaj por diversaj taskoj. La aliĝintaj landaj asocioj kun malpli ol 150 membroj rajtas elekti ne komitatanon, sed po unu observanto, kiu havas ĉiujn rajtojn kiel la komitatanoj kun la escepto de la voĉdona rajto. En la jaro 1954 la Komitato de U.E.A. konsistis entute el 37 komitatanoj, dum en 1964 ĝi konsistas el 63 komitatanoj, el kiuj 48 estas komitatanoj A, 6 apartenas al la kategorio B kaj 9 estas komitatanoj C. Krome, en la Komitato troviĝas 5 observantoj. La nombra kresko de tiu ĉi supera organo de la Asocio ŝuldiĝas al la kresko de la membro-nombro en la lasta dekjara periodo. La Estraro de U.E.A., kiun elektas la Komitato el sia mezo, konsistas nun el 8 personoj.

La organoj de la Asocio estas kutime elektataj ĉiun trian jaron. Normale, la sekvantaj elektoj devus okazi en 1965. Pro la fakto, ke en tiu jaro la Universala Kongreso okazos en Tokio, kie la Komitato povus esti sen la necesa kvorumo, ĝi unuanime decidis en Sofio mallongigi sian propran oficperiodon kaj tiun de la Estraro, kaj okazigi la novajn elektojn en 1964 antaŭ la Kongreso en Hago.

Nun, do, la tuta membraro, ĉu pere de siaj landaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj, ĉu pere de la ĉefdelegitoj kaj delegitoj, denove utiligos sian rajton libere elekti la superan organon de la Asocio, kiu siavice elektos la novan Estraron. La taskoj de la Asocio estas multnombraj kaj ne malofte tre malfacilaj. Necesas havi kiel eble plej elstaran kaj sindonan Komitaton, kiu kapablos gvidi la tutmondan movadon al novaj sukcesoj kaj kiu povos elekti el sia mezo Estraron tiel kompetentan, internacian kaj homogenan, kiel postulas la plenumado de la celoj de la Statuto, la taskoj de la Laborplano kaj la decidoj de la Komitato. Por certigi samtempe kontinuecon, spertecon kaj freŝecon de ideoj, kio estas grava elemento de sukcesa agado, estos ankaŭ utile atenti, ke la Komitato konsistu parte el elprovitaj malnovaj laborantoj kaj parte el novaj talentoj.

La membraro havas la decidan vorton. De tiu ĉi vorto dependas la agado de U.E.A. en la sekvanta trijara periodo.

I. L.



La kostoj de samtempa tradukado

Antaŭ ne longe mi ĉeestis internacian konferencon pri tinusoj (thunnidae), sub aŭspicio de la Organizaĵo por Nutraĵo kaj Agrikulturo de Unuiĝintaj Nacioj. La temo estis tre speciala, kaj tial la ĉeestantaro estis malgranda — nur 250 delegitoj el 18 landoj en la kvin kontinentoj. Tamen oni opiniis ĝin sufiĉe grava kunveno por ke ĝi ricevu helpon pri tiuj lingvaj malfacilaĵoj, kiuj nepre ĝenas ĉiujn internaciajn konferencojn escepte de tiuj, ĉe kiuj oni uzas sole Esperanton. Ĉar multaj personoj opinias, ke la iom nova sistemo de "samtempa tradukado" donas kontentigan solvon de tiuj malfacilaĵoj, mi prezentas kelkajn aktualajn informojn, precipe rilate al ĝia precizeco kaj ĝia kosto.

En nia konferenco estis permesataj tri "oficialaj" lingvoj, nome la franca, angla kaj hispana. En la kunvenoj, kiujn mi ĉeestis, la germanoj parolis (kaj supozeble komprenis) la anglan lingvon. Unu japano parolis propralingve, kaj poste liajn japanajn frazojn oni tradukis en la anglan por "samtempa" traduko en la francan kaj hispanan lingvojn.

La ses interpretistoj, kiuj deĵoris ĉe nia konferenco, estis ĉiuj sufiĉe kompetentaj. Kiel ĉiuj homoj sub streĉa premo, ankaŭ ili faris kelkajn eraretojn. Ekzemple, unu tradukis "mètres cubes" per "cubic feet", tiel enkondukante eraron de tridekoble en la nombron menciitan de la parolanto. La diferenco inter 10 kaj 300 kilogramoj da fiŝaĵo havas ja sciencon, eĉ ekonomian signifon; mi do demandas al mi, ĉu dum pli grava politika konferenco la interpretistoj ofte eraras sammaniere, kaj ĉu ĉiam oni korektas la erarojn ĝustatempe. Kompreneble, la tradukistoj malsukcesis en sia tradukado kiam oni diskutis teknikaĵojn, kvankam efektive teknikaĵoj estas inter la ĉefaj temoj de sciencaj konferencoj, kiuj, tiurilate, tute diferencas de politikaj kunvenoj. Kutime, scienca konferenco precipe servas por interŝanĝo kaj klarigado de novaj faktoj. La scienco progresas ĉe la limoj de nia scio, ne sur la kampo de informoj jam bone konataj. Tiu fakto malhelpas al la profesiaj interpretistoj; kaj pro tio ili iom malhelpas al ni reciproke!

Laŭ mia nepreciza kalkulo, la interpretistoj kutime tradukis sufiĉe ĝuste ĉirkaŭ kvar el kvin sinsekvaj frazoj. Unu sciencisto, klariginte ke en iu loko du rasoj de la koncernaj fiŝoj estas distingeblaj, tuj poste klarigis al ni la diferencojn inter tiuj rasoj. Sed la interpretisto, jam tradukante unu du frazojn post la sciencisto, havis tempon (aŭ lertecon) por

diri nur: "...kaj ekzistas kelkaj diferencoj inter la du rasoj".

Kiam la kunvenintoj parolis flue, kvazaŭ en konversacio, la "samtempa tradukado" fariĝis preskaŭ nebla. Mi eksciis de unu el la interpretistoj, ke ekzistas en la tuta mondo ne pli multaj ol 400 personoj de lia profesio — el kiuj, li libervole aldonis, nur 50 estas fakte unuarangaj. Ne necesas diri, ke tiu kvanto estas des pli nesufiĉa dum la konferenc-plenaj monatoj de somero. Plie, tiuj interpretistoj estas spertaj je tradukado de nur la ses sep "ĉefaj" eŭropaj lingvoj; mia informanto, kiu estas en tiu profesio jam 15 jarojn, diris, ke li scias pri neniuj interpretistoj, kies sperteco etendiĝas ĝis iu azia lingvo, ekzemple la japana aŭ indonezia.

Kompreneble, tiuj 400 interpretistoj ricevas tre bonajn salajrojn, pli ol \$ 250 semajne. Tial la kostoj, eĉ de tia konferenco, kia estis la nia, ĉiam altiĝas. Ĉar venis al nia dusemajna kunveneto ses interpretistoj, alfluginte el Genevo, Montreal, Montevideo kaj aliaj malproksimaj lokoj (sendube ne proprakoste), la organizintoj devis elspezi tre konsiderindan sumon por nia "samtempa tradukado" — certe ne malpli ol \$ 3.000. Krome estis necese konstrui por la interpretistoj specialajn sonizolitajn ĉambretojn kun grandaj fenestroj; tiuj aldonis preskaŭ \$ 2.000 al la elspezoj. La specialaj dratoj por la halo, la mikrofonoj por la interpretistoj, kaj aliaj necesaĵoj kostis pli ol \$ 1.000; tamen kelkaj el ili, ĉefe la radio-sendilo, kies kosto estis \$ 15.000, estis nur pruntitaj. Mi forgesis demandi pri la sendkostoj, tien kaj reen, trans la tuta kontinento de Nordameriko, kaj pri ties asekuro. La aŭskultilo por ĉiu individua delegito kostis po \$ 35 ĝis 40, do entute \$ 10.000 por la uzitaj aŭskultiloj. Ties ĉiutaga kontrolo, anstataŭigo de la baterioj je ĉiu kvara tago, kaj similaj taskoj okupis tri elektristojn dum la tuta konferenco. Kaj fine mi devas menci la bedaŭrindan fakton, ke oni antaŭvidis la "perdon" de almenaŭ ses el tiuj malpezaj, kvankam tre multekostaj, teknikaj ludiloj dum la kongreso; ĉu efektive oni perdis tiel ĝis la valoro de \$ 200 mi ne kuraĝis poste demandi.

Kiom da fiŝoj, mi demandas al mi — aŭ kiom da lernolibroj — estus aĉeteblaj per \$ 10.000, la proksimuma sumo, kiu estus ŝparebla en ĉiu internacia kongreso, se oni uzus Esperanton? Kaj kiom oni ŝparus, ne nur finance sed ankaŭ je eviteblaj miskomprenoj, se oni uzus la Internacian Lingvon!

Ralph A. Lewin



Latinameriko estas kontinento malmulte atentita en la lastaj jardekoj, sed nun per siaj rapida kresko kaj grandaj ekonomiaj problemoj postulanta ĉiam pli la atenton de la cetera mondo. En la programoj de Uno kaj Unesko helpo al la landoj de Latinameriko ludas gravan rolon. Analfabetoj ankoraŭ konsistigas la duonon de ĝia loĝantaro, kiu

kreskas per ĉirkaŭ 3% jare en la nuna tempo, kontraŭ ĉ. 2% por la monda loĝantaro. En la sekvantaj paĝoj ni fokusigas atenton sur la plej sudajn landojn de la kontinento: Argentino, Ĉilio kaj Urugvajo, kiuj kune ampleksas teritorion centoble pli grandan, ol tiu de Nederlando, kvankam kun nur trioble tiom da loĝantoj (ĉ. 32 milionoj).

*Supre:
Punta
del Este en
Urugvajo*

La "Suda Konuso"* vokas vin!

La unua demando, kiu prezentigas al sciemulo aŭ studemulo pri Latina Ameriko, estas la kialo de ĝia disdividiĝo inter 18 hispane parolantajn, unu koloson portugallingvan (Brazilo) kaj unu francdialektan (Haitio). Nu, jes, la historio. Jen mia unua truko: kiu deziras respondon pri tio, studu la historion de tiuj ĉi landoj. Tre kaprica estas ja la historio! Nur la historio povas tamen klarigi, kial Urugvajo estas sendependa de la Argentina Respubliko, kies unu el la konsistigaj provincoj ĝi estis iam, kaj okazis tiu ĉi sendependiĝo malgraŭ tio ke la hispana lingvo dialekte kaj prononce — se oni ne kalkulas kelkajn modajn aŭ slangajn esprimojn — estas la sama je ambaŭ flankoj de la riverego La Plata, ke la popolaj kutimoj, muziko, la gaŭĉa folkloro identas. Kaj tamen ekzistas diferencoj, eĉ grandaj.

Rigardu la geografion de la du landoj, prenu mapon! (Jen mia dua truko: vi faros parton de la laboro). Grandega estas la teritorio de Argentino, kvankam ĝi ne povas konkuri kun Brazilo. La ĉefurbo Buenos Aires (Bonaero) troviĝas sufiĉe terinterne sur la Riverego. Tamen, se vi deziras vojaĝi vaporŝipe (kaj mi

tre varme rekomendas tion al vi) riversupren ĝis Asunciono, la ĉefurbo de Paragvajo, vi bezonos kvar tagojn. Kaj vi vojaĝos konstante tra ebenaj regionoj. Malgraŭ tio, kiaj eksterordinaraj belaĵoj! La bordoj — vi jam lasis post vi la riveregon La Plata, nomo ekskluziva por la larĝa akvokunfluigo de la riveroj Paranao kaj Urugvajo, — de la Paranao kaj poste de l' rivero Paragvajo, kondukantaj vin al via destino rulas antaŭ vi konstantan CINERAMA-filmon de riĉa vegetaĵaro, fariĝanta praarbaro en la provincoj Corrientes kaj Formosa, kun birdoj ĉiuspecaj, kun tiaj sunsubiroj, koloroj de l' ĉielo kaj eĉ noktaj nebuloj, kaj antaŭ ĉio kun tia virgeco de la naturo, kiajn apenaŭ povas imagi Eŭropano. Vi alproksimiĝas jam al Asunciono kaj sur la rivero aperas tie kaj jene maldiligenta ĵakareo (krokodilo), dum en la arbaroj simioj petolas.


Kaj vojaĝante de Bonaero suden sur relvojo, vi rigardos dum 30 horoj tra la vagona fenestro sur senfinajn ebenaĵojn, iafaje konsistantajn el grenkampoj, sed poste dum longaj horoj vi vidos nur la dezertan pampon: kardojn, tufojn da altaj, sovaĝaj herboj; kaj da vivaj estaĵoj: ŝafoj, bovoj, jen strutoj, tie ĉaĥao⁽¹⁾, teru-

(*) La suda parto de Sudameriko formas geografian "konuson".

(1) La klarigon de tiuj birdoj vi trovos en la baldaŭ aperonta verko: "Martín Fierro".

teroj (!). Kaj vi povas kalkuli je viaj fingroj la nombron de la homoj. Eble, ĝis vi alvenos al la eksterordinara regiono de Bariloche en Centra Argentino, vi dronos en etete maldika polvo daŭre penetranta en la vagonon (kaj tial mi rekomendas preni por tiu vojaĝo la aeroplanon) —, sed vi estos spertinta la kielon de la vivo gaŭĉa, kaj da belajoj vi estos admirinta la ĉielon unikan de la pampoj, kie la nuboj pendas antaŭ via vizaĝo, invitante vin kapti ilin. Alveninte en Bariloche, vi vidos ke ekzistas en Suda Ameriko teritorio de lagoj kaj montoj, kiun mi estas tentata nomi "Super Svisujo", ĉar ĝi superas Svisujon je naturvidindaĵoj kaj je vasteco (nur la Argentina parto de tiu regiono superas la teritorion de Svisujo, sed ĝi pluetendiĝas ankoraŭ tra granda parto de Ĉilo). Vi sentos vin tie pli proksima al Dio pro la sovaĝa praeco de tiu pejzaĝo, pro la brilaj koloroj kaj pro la paco, io — mi kredas — jam nur trovebla er-kvante eĉ en Svisujo.

trankvila
Montevideo



Kaj Urugvajo? De Bonaero vi povas preni aviadilon aŭ ŝipon ĉu rekte al Montevideo, ĉu tra Colonia, kie la riverego estas pli mallarĝa. Aŭtobuso vin portos en du horoj de Colonia al Montevideo. Vi tuj vidos ke la pejzaĝo ŝanĝiĝis. La ebenaĵo ne plu estas sovaĝa kaj absolute glata, la tuta tereno ŝajnas ondadi. La atmosfero, eĉ la klimato mildiĝis. Ĉu diri ion pri Montevideo? Se vi vidis antaŭe Rio de Janeiro'n, unu el la plej belaj urboj de l' mondo, kun sia admirinda Copacabana-strando, kie laŭlonge de la marbordo leviĝadas arbaro da nubskrapuloj, dum en la fono kaj ĉirkaŭe ornamas la panoramon la naturstatuoj

de la montoj kun sia tropika vegetaĵaro, vi eble iom ridetos, ĉar la Montevidea Pocitos-strando ŝajnas kopio de Copacabana — sen iaj montoj —, tamen kun la tuta ĉarmo de la urugvaja mildeco, reflektiĝanta ankaŭ en la senbrua, ĝentila karaktero de ĝia loĝantaro. Se la bruo kaj vehemenca trafiko de Bonaero ekscitis viajn nervojn, vi trankviliĝos en Montevideo ĉe ties multnombraj golfetoj kaj strandoj, serpentumantaj ĉirkaŭ la tuta urbo ĝis la eleganta parkkvartalo Carrasco, kaj plu, jam ekster la urba limo, ĝis la mondfama Punta del Este, kaj plu ankoraŭ tra etaj kaj pli grandaj banlokoj marbordaj kun — por Eŭropanoj — izolaj sablostrandoj ĝis la Brazilia landlimo. Pinarboj kaj eŭkaliptaj boskoj mildigas la sunbrilon ĉe tiuj banlokoj, jen kial — kaj ankaŭ pro la pli bona klimato urugvaja — la argentinanoj pliriĉigas somere per sia turismo la urugvajan ekonomion.

La entuziasmo de la temo forportis min tra tro da spaco, tamen nur etajn punktojn mi povis tuŝi. Kiom da demandoj ankoraŭ sen respondo! Sed mi devas jam paroli pri la Esperanto-movado kaj pri la helpo, kiun alikontinentanoj povus doni al ni. Ne petu de mi detalojn pri la indiĝenaj lingvoj, ĉar la indianoj (Urugvajo estas preskaŭ tute eŭroprasa) dume ankoraŭ ne estas kandidatoj por la studado de Esperanto. Necesos antaŭe levi ilian vivnivelon. Sed sciu ke tre malforta estas la movado en la hispane parolantaj landoj de tuta Ameriko, dum ni kun envio kaj admiro rigardas la floradon de la Esperantista vivo en Brazilo. Jes, vi povas helpi nin! Kaj ĝuste tial mi parolis tiom pri la naturbelajoj, por ke vi venu unuope aŭ karavane. Ĉiu vizitanta Esperantisto povas iom kunhelpi por elmontri al la publiko la praktikan aplikeblon de la internacia esprimilo. Ni ĵus havis la viziton de s-ino Doris Worcester. Du-tri vizitoj ĉe lokaj ĵurnaloj, kiuj publikigis simpatiajn intervjuojn, du prelegoj kun lumbildoj kaj jam ni sentas nin kuraĝigitaj por la proksima sezono.

Kaj jen miaj praktikaj proponoj. La t.n. "Suda Konuso" de Ameriko (Brazilo, Urugvajo, Argentino, Paragvajo, Ĉilo, Bolivio) — pri la aliaj landoj mi sentas min tro nekompetenta — baraktas jam de jaroj en ekonomia krizo: la prezoj de la eksport-produktoj de tiuj landoj malaltiĝis tutmonde, dum la importataj komercaĵoj plikariĝis. La sekvo estas inflacio, senlaboreco, ĝenerala maltrankvilo. Granda turisma movado, kiu fluus al nia mondparto, povus restarigi la ekonomian ekvilibron. Kaj kiom da belajoj la Eŭropanoj povus vidi ĉi tie, kiom ili povus ĝui la sunon en la monatoj Oktobro ĝis Marto, kiam en Eŭropo ili devus rifuĝi ĉirkaŭ la fornoj. Ni Esperantistoj ĉi tie agrabligos al ili la restadon en Sudameriko, pli ol tion kapablas la kono de la hispana aŭ portugala lingvo. Per via vizito servante tiel kaj al Sudameriko ĝenerale, kaj nerekte al Eŭropo mem, vi estos farinta la plej grandan servon al Esperanto: ĝian praktikan valorigon por interpopola harmonio!

Ernesto Sonnenfeld

Argentino

Argentino estas lando kiu geografie estas eksterordinare bonsitua; ĝi havas ĉiujn klimatojn kaj topografiajn aspektojn: ek de la subtropika nordo ĝis la frosta sudo, de la montara okcidento ĝis la mara oriento.

Bone trafluata de riveroj, ĝi posedas nekompereblajn terenojn kiuj produktas grandajn rikoltojn kaj permesas la bredadon de bonega brutaro kiu famigis Argentinon en la mondaj merkatoj.

La ĉefa karakterajo de la argentina teritorio — la plej granda en Sudameriko post Brazilo — estas la ebenaĵoj kaj la ebenaltaĵoj. En la norda parto kun subtropika klimato ekzistas la grandaj arbaroj, en la centra parto kun milda klimato: la grandaj ebenaĵoj (pampo) kaj en la suda parto kun malvarma klimato la Patagoniaj ebenaltaĵoj, kie alternas ŝtonaj montetoj kun fruktodonaj valoj. La teritorio similas al granda triangulo kies norda flanko signas la limon kun Bolivio, Paragvajo kaj Brazilo; la okcidenta flanko estas identigita kun la Ando-Montaro kaj longas proksimume 3.500 kilometrojn; dum la orienta parto limas parte kun Brazilo kaj Urugvajo kaj la resto kun Atlantika Oceano kies marbordoj estas longaj ĉirkaŭ 2.500 kilometrojn.

La argentina popolo konsistas plejparte el eŭropdevenaj idoj. La indiĝenaj praloĝantoj malaperis ĉu per la konkeraj militoj, ĉu per miksiĝo kun eŭropanoj; ekzistas nur malgrandaj indiĝenaj komunumoj en la nordo de la lando, sed entute ili ne atingas 1/2% de la tuta loĝantaro. Same okazis kun la negroj, kiuj kiel sklavoj estis importitaj de la hispanaj regintoj; kiam Argentino ekkomencis sendependiĝi de Hispanujo, la negroj estis liberigitaj kaj poste ili kunfandiĝis kun la ceteraj rasoj.


La oficiala lingvo estas la hispana, kaj tial ĝi estas parolata en la tuta teritorio. Nur en la nordo — kiu konservas iom da tradicio de la indiĝenaj praloĝantoj — oni parolas, apud la hispana, la gvaranian kaj keĉuan lingvojn; sed tion ĉi faras nur la malaltaj popolaj tavoloj, ĉefe tiuj kiuj loĝas for de la grandaj komunumoj.

Kune kun la naskiĝo de la lando, naskiĝis ankaŭ ĝia literaturo kaj aperis elstaraj verkistoj kiuj kontribuis kaj kontribuas al la formado de nacia verkaro. Paroli pri tio okupus multe da spaco kaj tial oni ne povas funde paroli pri ĝi, en artikolo kiel ĉi tiu. Nur oni menciui ke inter la klasikuloj la plej elstara estas José Hernandez, aŭtoro de la granda nacia eposo "Martín Fierro". Domingo Faustino Sarmiento, Esteban Echeverría, José Mármol, Estanislao del Campo, kompletigas la "klasikan stabon". Inter la nuntempuloj oni povas mencii: Ricardo Güiraldes, Leopoldo Lugones, Ernesto Sabato, Ricardo Rojas, Enrique Larreta, Leónidas Barletta, Jorge Luis Borges, Eduardo Mallea, kiuj jam atingis internacian famon.

La Internacia Lingvo en Argentino

En preskaŭ tuta Ameriko ne ekzistas interna lingva problemo. De 21 landoj kiuj konsistigas la "Panamerika Unio"-n, nur en la plej norda lando (Usono) oni parolas la anglan lingvon kaj en Brazilo, la portugalan. En la ceteraj 19 landoj estas parolata la hispana. El tio rezultas ke Lingvo Internacia ne estus "nepra neceso". Krome, parolante pri Argentino, ni povas diri ke ĝi situas for de la naturaj komunik- kaj transportlinioj (ĝi estas la plej suda lando en la mondo) do, signifas, ke ĝi ne estas "trafika" lando, tio estas lando kiu peras turismon, transporton, komercon, k.t.p., kiel okazas ekzemple en Eŭropo, kie personoj

latinameriko



En Argentino kiel en tuta Sudameriko, moderno kaj malmoderno kunekzistas. Sur la foto: kongresanoj de Argentina Esperanto-Ligo, Venado Tuerto, 1963

latinameriko

kiuj vojaĝas de unu lando al alia, devas trairi trian aŭ kvaran por atingi sian celon. Tio kaŭzas ke turismo, komerco, transporto, rilatoj diversaj, k.t.p., devas veni *speciale* al Argentino kaj tiu situacio multe malpliigas la interŝanĝon de personoj, kun kompreneble malpliigo de lingvaj baroj.

Estas rimarkinde ke la vojaĝoj de alikon-tinentanoj (alilingvanoj) estas relative tre maloftaj pro la menciitaj kaŭzoj. Pro tio, tiel la aŭtoritatuloj kiel la ĝenerala publiko ne "sentas" veran neceson de internacia lingvo. Tial Esperanto disvolviĝis ĝis antaŭ kelkaj jaroj en amatoraj, idealismaj medioj. Kiam oni atingis ion de aŭtoritatuloj (nomigo de stratoj, starigo de Tago de Esperanto en la Lerneja Kalendaro en Provinco Santa Fé, atingo de lernejoj por oficiala aŭ neoficiala instruado, stipendioj, k.t.p.), tio okazis ĉar oni havigis al ni la influon de certa amika aŭtoritatulo, sed ne per la plena konvinko de la registaranoj.

Urbo
Ushuaia
(Argentino)
la plej suda
en la mondo

Tamen dum la lastaj jaroj la disvastigo de Esperanto fariĝas pli kaj pli vigla, ĉefe en la studentaj kaj instruistaj medioj. Menciinde

estas, ke la Fakultato de Filozofio kaj Beletro en Rosario, kiu de antaŭ kelkaj jaroj permesis la instruadon de Esperanto en sia Instituto de Moderna Filologio, ek de 1963a oficialigis la kurson kaj disdonas oficialan diplomon.

En la lastaj jaroj formiĝis en la lando ĝenerala favora etoso kaj rimarkiĝas ekfloriĝo ĉiam pli kreskanta, do, ni ne troigas dirante ke baldaŭ ni povos atingi gravajn sukcesojn. Sed, ni antaŭvidas ke por la progresigo de Esperanto estas necesa la helpo de eksterlandanoj kaj ĉefe de la esperantaj instancoj, *speciale* de U.E.A.

Por la progresigo de Proksima Oriento kaj Afriko, U.E.A. subtenas APO-n. Ameriko ĝenerale ne bezonas senditojn por la instruado de Esperanto, sed U.E.A. povus krei komisionon kiu kunlaboru kun la ekzistantaj societoj en Ameriko por la pli bona disvastigo de Esperanto.

Por fini, mi devas diri ke la ĝenerala impresado pri la Esperanta situacio en Argentino estas tre optimisma, malgraŭ la malfacilaĵoj.

Hugo A. Lingua



Tri arboj

Tri arboj falintaj
restis ĉe la bordo de l' vojeto.
La hakisto ilin forgesis kaj ili
konversas am-kunpremite, kiel tri blinduloj.

La sun' de subiro metas
sian sangon vivan en la fenditajn lignojn,
kaj portas for la ventoj la aromon
de ilia flanko aperta!

Unu, tordita, etendas
sian brakon gigantan kaj de foliaro treman
al la alia, kaj ĝiaj vundoj estas
kiel okuloj du, plenaj de peto.

La hakisto ilin forgesis. La nokto
venos. Mi estos kun ili.
Ricevos en la kor' iliajn mildajn
rezinojn. Al mi ili estos kiel fajro.

Kaj mutajn kaj alpremitajn
nin trovu la tago, en unu grupo funebra.

Gabriela MISTRAL

La Ĉilia poetino Gabriela Mistral (1889-1957) estas la unika virino de hispanlingva Ameriko, kiu ricevis la premion Nobel de Literaturo (1945). Ŝia poezio sin distingas per stila kaj tema simpleco, profunda amo al la naturo kaj al la infanoj, kaj viva kompato kun ĉio, kio suferas. Ŝiaj ĉefaj verkoj — poeziaj kolektoj — aperis sub la titoloj: "Desolación" (Mal-espero), "Ternura" (Tenereco), "Tala" (Detruo), "Poemas de las Madres" (Poemoj de patrinoj) kaj "Sonetos de la Muerte" (Sonetoj de la morto). Instruistino laŭ sia profesio, ŝi disvolvis vastan agadon sur sociala kaj pedagogia kampo, estis membro de l' Instituto de Intelakta Kooperado ĉe la estinta Ligo de Nacioj, dumviva honora konsulo de Ĉilio en diversaj ĉefurboj de Eŭropo kaj honora gasto de multaj amerikaj ŝtatoj, kiuj rekonas en ŝi reprezentan figuron de sia kultura vivo.

Notoj kaj traduko de Emilio Pfeffer

Gloso: konversas = konversacias

El la kantkonkurso inter La Negro kaj Martin Fierro

LA NEGRO

Ne stumblu nun lango mia,
evitu halton kaj ligo —
neniu sen et-eraro
sukcesis la perfektigon;
kaj kiu ŝatas navigon
ne havu timon pro l' maro.

Demandojn miajn mi faros
laŭ via invit-formulo,
kaj venkos vi en konkuro,
se donos vi klaron per kanto
pri l' tempo, pri la mezuro,
pri l' pezo kaj pri la kvanto.

Nu, via estos la venko
se igos vi ĝin plenklari —
mi devas al vi deklari
tutrekte kaj tre sincere:
neniu al mi ja vere
klarecon kapablis fari.

En mia libro forestas
pri jeno ĉia mencio —
respondu vi do pri tio,
kaj servos al mi l' ideo:
motivon kian por kreo
de l' kvanto do havis Dio?

MARTIN FIERRO

Nigrul', vi lasas vin fali
al nesto kiel vulturo —
vi estas certe lertulo;
mi ankaŭ, tamen, jam pretas,
respondon mi do almetas
por venki en la konkuro.

Unikas la universo,
la mondo kaj nia suno —
unikas ankaŭ la luno,
ĉar kvanton ne kreis Dio.
Kreint' de ĉiom kaj ĉio
nur formis Tuton sen Ono,
la reston kreis la homo
per sia kalkulikono.

LA NEGRO

Al dua demand' respondon
mi aŭdus nun kun plezuro:
l'Estajo kreanta vivon
ja havas pri ĝi arkivon —
sed mi malkonas motivon
por kreo de la mezuro. —

*En kunligo kun la
artikoloj pri Latin-
ameriko ni prezentas
sur ĉi tiu paĝo eron
el unu plej konata
verko de Sudameriko,
samtempe ĉefverko
kaj iasence la nacia
eposo de Argentino.*

*"Martín Fierro", unue
eldonita en la jaro
1873 kaj jam vaste
tradukita, prikantas la
heroan vivon de la
gaŭĉo, la vaganta
kamparano de Argen-
tino.*

*La tuta verko, ĉirkaŭ
1200 strofoj, aperos en
eldono de STAFETO
en la serio "Oriente-
Okcidento" sub aŭspi-
cio de UEA.*

MARTIN FIERRO

Aŭskultu do kun atento
pri jena la argumento:
mezuro estas invento
de l' hom' por sia bezono —
kaj mi pri tio ne miras,
ĉar klaras kun evidento:
mezuri Dio deziras
nur vivon ja de la homo.

LA NEGRO

Se via scio ne mankas,
venkanto mi vin konfesas —
ja lerni ĉion necesas
por kiu kanton praktikas —
kaj nun, ĉu vi do eksplikas:
la pezo kial ĝi pezas?

MARTIN FIERRO

Sekretojn Dio konservas
— ĉi tiun inter aliaj —
la pezo por fali servas
al ter' en formoj variaj —;
kaj ĉar mi kompreni strebas,
laŭ mi do la virtojn bonajn
la pezo pripesi devas
kaj ankaŭ la kulpojn homajn.

LA NEGRO

Respondu jenan demandon
kaj via estos la venko —
per dekstra mi ĝin sigelas —
respondu en ĉi momento:
formiĝis kiam la tempo
kaj kion Di' per ĝi celas?

MARTIN FIERRO

Mi diros do sen bombasto,
laŭ mia povo kompreni:
la tempo estas prokrasto
de kio devas alveni.

Ne estis komenciĝado,
nek estos ia ajn fino,
ĉar estas la tempo rado,
ĝi radas sen ia limo.

Se homo ĝin uzas splitan,
laŭ mi li tiel procedas:
ĉar li la parton vivitan
de la vivota dismetas.

Kurado en gvida vico
ne povas la gajnon doni;
se volas vi pluon koni,
nek povas ion kompreni,
vi rajtas pri mi ordoni
por vian dubon forpreni.

El la
hispana
tradukis:
Ernesto
Sonnenfeld



**PROFESORO MARIO PEI
ESPRIMAS SIN SENKOMPROMISE
POR ESPERANTO**

En la revuo "*The International Language Review*", eldonata en Usono de s-ro Floyd Hardin, okazis vasta diskuto pri la temo "Ĉu Esperanto estas la Respondo al la Monda Lingva Problemo?" La tuta afero komenciĝis tiel, ke la redaktoro de la menciita revuo reprenis komplete el "Esperanto", julio-aŭgusto, 1962, la artikolon de Prof. D-ro Ivo Lapenna "Falsaĵoj, Antaŭjuĝoj, Ignorado, Blufoj...". Aro da personoj publikigis artikolojn kun aprobaj aŭ malaprobaj rimarkoj, ne malofte ankaŭ misprezentoj, en la sama n-ro 28 de "*The International Language Review*".

Responde al la multaj misprezentoj, publikigitaj en la n-ro 28 de la menciita revuo, Prof. Ivo Lapenna publikigis 12-paĝan artikolon "Jes, Esperanto estas la Respondo al la Monda Lingva Problemo" en la n-ro 29/30, oktobro 1962 — marto 1963. En tiu numero aperis ankaŭ artikolo de D-ro Aleksander Gode, la konata protagonisto de la lingvoprojekto "Interlingua". Aro da aliaj personoj, inter kiuj s-ro Pierre Burney, la aŭtoro de la verketo "*Les Langues Internationales*", kies gravaj eraroj troviĝis en la radikoj mem de la tuta diskuto, aperigis plurajn kontribuojn. En la n-ro 31 la redaktoro de la revuo publikigis leterojn de D-ro Alexander Gode, D-ro Ivo Lapenna, D-ro Victor Sadler, Mag. William Auld pri la planita debato Gode-Lapenna, kiu ne povis okazi pro la malsameco de opinioj inter D-ro Gode kaj D-ro Lapenna rilate la esencan karakteron, kiun devus havi la diskuto. En tiu numero ankaŭ la redaktoro mem, s-ro Floyd Hardin, publikigis sian opinion.

Fine, en la numero 32, julio-septembro 1963, aperis konkludaj artikoloj de D-ro Gode kaj D-ro Lapenna. La mondfama lingvisto D-ro Mario Pei, kiu en sia artikolo "Ĉu Unu lingvo por la Mondo?", publikigita en la novembra numero, 1963, de UNESKO-Kuriero, efektive esprimis sin favore al Esperanto, nun aperigis, tuj post la konkludaj vortoj de D-ro Lapenna, sian opinion sub la titolo "Rimarkoj pri la Esperanto-Simpozio".

En siaj rimarkoj Prof. Mario Pei emfazas, ke ekzistas unu "konstruita lingvo", kiu havas pli da adeptoj kaj estas pli vaste rekonita ol kiu ajn alia. Tiu lingvo, laŭ Prof. Mario Pei, pruvis, (i) ke ĝi povas altiri grandan kaj tre entuziasman sekvantaron; (ii) ke ĝi povas kontentige servi al ĉiuj celoj de parolata kaj skribita lingvo, eĉ produkti sian propran originalan literaturon kaj poezion; (iii) ke ĝi povas altiri la intereson kaj atenton de registaroj; (iv) ke ĝi povas altiri la intereson kaj atenton de eksteruloj ĝis tiu grado, ke ekzistas multaj, kiuj ne estus aŭdintaj pri ĝi kaj kiuj ne egaligus ĝian nomon kun la koncepto de

"internacia lingvo". Tiu lingvo, diras Prof. Pei, estas Esperanto. Konklude, Prof. Pei diras:

"Mi ne diras, ke Esperanto alportos pacon... La sola espero... estas la konstanta kaj pacienca konsiderado kaj solvado per diskutoj kaj raciaj kompromisoj de la problemoj de la mondo; la posedo kaj uzo de komuna dua lingvo estas absolute necesa... kaj la plej kuraĝiga espero por tia komuna, dua lingvo por la mondo estas Esperanto".

Mario Pei estas profesoro de latinida filologio en la Columbia Universitato de New York. Li estas la aŭtoro de pluraj gravaj verkoj, inter kiuj aparte menciindaj estas "*The Story of English*" kaj "*One Language for the World*". Li estas unu el la plej mondfamaj nuntempaj lingvistoj. CED esperas publikigi lian artikolon, kiu fakte fermas la debaton, kiel unu el siaj dokumentoj, kaj, se iel eble, ankaŭ en esperantlingva traduko en la revuo Monda Kulturo.

KONSERVO DE PIONIRAJ VOĈOJ

Sub la aŭspicio de la Londona Esperanto Klubo, s-ro Peter Schilperoord entreprenis gravan taskon: konservi por la posteularo la voĉojn de niaj pioniroj. En la letero al CED s-ro Schilperoord prezentis la planon de agado, el kiu vidiĝas ke la celo estas konservi por la estontaj generacioj la voĉojn de la pioniroj per surbendigo. Kiel pioniro estas konsiderata ĉiu persono, kiu fariĝis esperantisto jam en la pasinta jarcento, kaj ankaŭ aliaj eminentaj esperantistoj, pli junaj, sed tamen pioniroj en specialaj medioj. Estos kolektataj ankaŭ la registritaj voĉoj de jam mortintaj pioniroj. Krome, estos kolektataj fotoj, prefere diapozitivaj, kaj biografiaj notoj.

Por plenumi sian taskon s-ro Schilperoord bezonas, kompreneble, la helpon de aro da kunlaborantoj, kiuj posedas magnetofonon aŭ povas relative facile disponi pri ĝi, kaj kiuj estas pretaj surbendigi la voĉojn de la pioniroj kaj prizorgi ĉiujn teknikajn detalojn. CED varme rekomendas al la interesigantoj doni la necesan helpon kaj turni sin por ĉiuj detalaj informoj al s-ro Peter Schilperoord, *Administranto K.P.V., 10, Langbourne Avenue, Highgate, London, N. 6, Britujo*.

Kiam la laboro estos finita, CED ricevos unu kopion de la bendo por sia arĥivo.

**ENKETO PRI LA EDUKA VALORO DE
ESPERANTO**

Sinjoro R. H. M. Markarian entreprenis por CED enketon pri la eduka valoro de la instruado de Esperanto en la lernejoj. S-ro Markarian turnos sin rekte al nombro da lernejoj el diversaj landoj kun konkretaj demandoj rilatantaj al la temo. CED petas ĉiujn geinstruistojn, kiuj ricevos la demandaron, nepre respondi absolute objekte, tiel ke la enketo povu kiel eble plej fidele prezenti la ĝisnunajn spertojn. Tuj post la finiĝo de la enketo CED publikigos apartan dokumenton pri la rezultoj.

CED-DOKUMENTOJ EN ESPERANTO ?

Kiel konate, CED eldonas siajn dokumentojn unuavice en la angla, sed kelkfoje ankaŭ en aliaj naciaj lingvoj, precipe la franca kaj hispana. Tiuj dokumentoj estas sendataj al neesperantistaj organizaĵoj, institutoj kaj institucioj. Tamen, en la lastaj monatoj ĉiam pli kaj pli da unuopaj esperantistoj deziris ricevi la CED-dokumentojn. Konsiderante tiun interesigon, CED decidis eldonadi estontece siajn dokumentojn ankaŭ en la Internacia Lingvo, se troviĝos minimume 100 regulaj abonantoj. La jara abono por la esperantlingva eldono estos gld. 5,50. La Esperantaj organizaĵoj kaj unuopuloj, kiuj deziras aboni la serion je tiu prezo, bv. tion komuniki per

poŝtkarto, kun preciza indiko de sia adreso, al la C.O. de UEA en Rotterdam. Ne necesas sendi la monon por la abono, sed nur esprimi la deziron aboni. Se estos minimume 100 interesigantoj, CED eldonos la dokumentojn ankaŭ en Esperanto kaj tiam alvokos la sinanoncintojn pagi la sumon de 5,50 gld. jare. Se ne troviĝos 100 abonantoj ĝis la fino de aprilo, la dokumentoj aperados, kiel ĝis nun, nur en la angla kaj kelkfoje en aliaj naciaj lingvoj.

Donacoj

La listo de donacoj, ricevitaĵoj por CED en la periodo inter la 30-a de septembro kaj 31-a de decembro 1963, aperos en la marta numero de "Esperanto".

LA SEPA UNIVERSALA EKSPOZICIO DE ESPERANTO

Se lokaj cirkonstancoj estos favoraj, do plej kredeble okazos en Hago samtempe kun la 49-a Universala Kongreso la sepa elmontraro de la Universala Ekspozicio, ĝuste dek jarojn post ĝia kreiĝo. Kiam en 1954 prezentigis la ebleco de adekvata reprezentiĝo ĉe la Generala Konferenco de Unesko en Montevideo, tiam centoj da eldonistoj, organizaĵoj kaj individuoj en la tuta mondo kontribuis dokumentojn kaj eldonaĵojn por per nerifuteblaj pruvoj vidigi al la delegitoj al la Generala Konferenco, kiom vaste la Internacia Lingvo estas fakte aplikita, kaj kiom da daŭraj valoroj estas en ĝi kreitaj. Tiu "Unua Universala Ekspozicio" estis elstare sukcesa, kaj sen ia dubo kontribuis al akceptigo de la favora rezolucio IV.1.4.422, kaj al la starigo de konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko.

La materialoj de la Unua Universala Ekspozicio — plejparte libroj, broŝuroj, turismaj eldonaĵoj, k.s. — revenis el Montevideo al la Centra Oficejo de UEA, kaj restas posedaĵo de UEA sub kontrolo de CED. Ĝis hodiaŭ ĝi estas elmontrita en kvar Universalaj Kongresoj: Kopenhago (1956), Mainz, Varsovio kaj Harrogate, kaj ĉe la Eŭropa Konsilantaro en Strasburgo. Principe la Ekspozicio restas senpage disponebla por kiu ajn taŭga okazo kie ajn en la mondo, se troviĝas konvenaj ejoj kaj kapablaj prizorgantoj, kaj sub la kondiĉo, ke la transporton en ambaŭ direktoj pagu la lokaj organizantoj.

La ĝenerala klasigo de la ekspoziciaj materialoj estas jam anticipe farita. Al la taskoj de surlokaj organizantoj apartenas antaŭ ĉio la beligo de la montraĵoj per afiŝoj kaj indikiloj, kaj la pretigo de nacilingvaj klarigaj tekstoj. Speciala dokumento de CED (CED/Int. 4/-Aldono), kiu klarigas la sistemon de la Ekspozicio kaj donas detalajn konsilojn pri ĝia utiligo, estas ricevebla de la Centra Oficejo por organizaĵoj, kiuj serioze antaŭvidas okazon por nova elmontraro de la materialoj. La Universala Ekspozicio prezentas gravan kolekton de la Esperanta literaturo kaj gravan ĉie uzeblan dokumenton pri la movado. Estas tial tre dezirinde, ke la diversaj informaj fakoj studu la eblecojn por ĝia elmontraro, tiel ke almenaŭ unufoje ĉiujare ĝi estu utiligata.



parto de la Ekspozicio

Alvoko

Neniu dokumento pri la Internacia Lingvo estas finfarebla unu fojon kaj por ĉiam. Ĉiujare kreskas la literaturo de Esperanto, ĉiujare eldoniĝas novaj periodaĵoj kaj turismaj folioj. Por la vizitantoj al Universala Ekspozicio, kiuj precipe interesiĝas pri la nuntempaj aplikoj de Esperanto, multe pli imponas la plej novaj kaj kutime plej bonaspektaj libroj kaj gazetoj. Tial, se la Universala Ekspozicio restu objektiva dokumento pri la lingvo, estas bezonata la daŭra kaj komprenema kunlaboro de ĉiuj Esperanto-eldonistoj. Pluraj eldonistoj jam senmanke kontribuadas al la Ekspozicio: ni menciuj Stafeton kaj la Ĉinan Esperanto-Ligon. Al ĉiuj aliaj ni do direktas fortan vokon, en la intereso de bona informado pri la Internacia Lingvo sendi al la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, ĉiujn en la lastaj jaroj aperintajn librojn kaj aliajn eldonaĵojn kun klara indiko "por la Universala Ekspozicio". Ideale estus, se ĉiuj sendadus al la C.O. de ĉiu nova eldonaĵo krom unu recenzekzemplero kaj unu ekzemplero por la Biblioteko de UEA ankaŭ unu ekzempleron por la Ekspozicio. La samo validas por personoj, kiuj respondecis pri eldonigo de turismaj broŝuroj. Ĉiujn donacontojn, same tiel de malnovaj kiel de la plej novaj eldonaĵoj, ni anticipe kore dankas.

Vivo kaj opinioj de Majstro M'saud, de Jean RIBILLARD. Eld. Stafeto, La Laguna, 1963. 128 p. 19 × 12 cm, plus 6 bildopaĝoj. Serio Beletraj Kajeroj n-ro 18. Prezo: 5,70 gld. (22,8 st.)*

Kurioza libro, ofte rava, ĉiam cerboekscita. La protagonisto-memoristo M'saud estas araba azeno, per kies vivrakonto ni intime ekkonas la vivon en oaza vilaĝo, ĝiajn morojn, pejzaĝojn, loĝantojn, mentalon. Evidente la aŭtoro persone spertis ĉion ĉi; tamen sub la verniso de l'arabaj esprimmaniero kaj etoso facile percepteblas la franca sala humuro, kies akra skeptikemo fandiĝas kun rezignacia fatalismo ambaŭ fontantaj el nia olda trosaga eŭropeco. Tian tembron havas la moralaj instruoj de onklo Musa — maljuna azeno mentoro de M'saud — kaj la abundaj filozofiaj meditoj, kaj la superfluaĵaj interpretoj de mitologiaj epizodoj.

Specimene mi citos la jenan konsilon: "Oni facile pardonos al vi malnoblan animon aŭ perfidan koron, oni volonte toleros, ke vi estos malbonfara aŭ senhontega, vi ĉie trafos amikojn aŭ komplikojn, kiaj ajn estos viaj malvirtoj (...). Dum se vi manifestos altan talenton, kreman guston aŭ superan spiriton, vi ofendos la popolamason, kiu malmilde traktos vin" (p. 63) Nenio nova: tian ideologian grundon ni parkere konas ekde la maksimumoj de La Rochefoucauld.

El tiu ĉi pesimisma kaduka marĉo elmergiĝas, tamen, fajnaj juveloj: vivaj figuroj skizitaj kun akuta psikologia penetremo (Ĝoha, Mabruka, onklo Musa ...); priskriboj de moroj kaj medioj de l'araba mondo (etaĵ ĉefverkoj: la kartludo p. 66; la batalo p. 75); pejzaĝoj, lokoj elvokive pentritaj per bunta paletro.

Konfesinde: antaŭ ol legi Ribillard mi neniam supozis, ke nia lingvo povas esti tiel sukoza. Ĝin li ekspluatas ĝis ekstremaj ebloj. Tiom, ke foje, kvazaŭ manĝinte trospicitan frandaĵon, la leganto estas minacata de misedigesto.

Kvankam admirante tiun ĉi frazarton ("poezia prozo"), mi ricevis la impreson, ke la aŭtoro konstante intence serĉas la raran kuriozan fakan ŝokan esprimon. Tial lia vortara majstreco danĝere limas kun artefarita barokismo.

Jen laŭdinda ekzemplo, en kiu la stila muziko respondas al reala interna neceso: "En tiu serena haveneto, kiun ne atingas la konfuza murmuro de la vilaĝo, la tadoj de la taglaboro konsumiĝas kun la fumo de la pipoj, dum mortiĝas la lasta rozo en sunbrula turmento" (p. 66). Mi estus tentata eksklami: fine ni havas nian Flaubert.

Sed alifoje Ribillard senbride trouzas sian lertecon. Tiam la vortjonglado estas celo en si mem. Aŭdiĝas reeĥo de la 17-jarcenta barokismo; mi emus diri: jen ni havas nian Daniello Bartoli. Jen ekzemplo: "Kiajn problemojn mi traktos sen farĉi vian cerbujon

per magistra balasto? Ne same kiel la homoj mi subtilaĉe forbabilos mian tempon, ankaŭ la vian, per dialektiko malinda de via streĉa timpano" (p. 59).

Nedubeble tia verkisto utilegus al nia lingvo, en la nuna stagna povreco de ĝia prozo. Per iom pli da kritika kontrolo li povus eble liveri al ni ĉefverkon honorontan nian feblan literaturon. Des pli mi bedaŭregas, ke tiu ĉi soleca muzikvoĉo jam forpasis en la silenton. Al lia memoro mi omaĝas, kaj dankas la eldoniston, kiu permesis al ni ĝui lian lastan kanton. Sen Rodin

Aventuroj de pioniro, de Edmond PRIVAT. Eld. Stafeto, La Laguna, 1963. 144 p. 19 × 12 cm, kun 18 bildpaĝoj. Serio Beletraj Kajeroj n-ro 17. Prezo: 6,85 gld (27,4 st).*



Privat (dekstre) ĉe Unesco, Parizo, 1952

Nostalgio povas difekti juĝkapablon. Ĉu, do, mia plena ĝuo de la aŭtobiografiaj rakontoj de Edmond Privat fontis el tio, ke ili temas pri mia pli juna vivperiodo kaj lumigas la tiutempan historion de nia movado kaj de aliaj liberigaj kaj bonfaraj aktivecoj, kiel nur partopreninto povas fari?

Mi tion diras ĉar mi aŭdis junan kleran lingviston severe kritiki verkon de Privat. Estas evidente ke la komento en la enkonduko: ke Privat al multaj estas "la esperantisto", povas validi por mia generacio sed eble ne por la junularo. Sed en epoko kiam esti "tro juna" estis fina kondamno, Privat je aĝo dek ok proprainiciate pledis por Esperanto al la Prezidanto kaj Vicprezidanto de Usono kaj estis ankoraŭ junulo kiam li faris gravajn kontribuojn al nia historio dum unu el ĝiaj tre fekundaj periodoj.

Imagu la interesan materialon je lia dispono. Li estis sviso, kiu vivis en Anglujo, Francujo kaj Usono kaj faris prelegvojaĝojn al cara Rusujo kaj aliaj landoj antaŭ la unua mond-

Cion ricevitan ni mencias. Verkojn por recenzo ni elektas inter la duope ricevitaĵ. Ne-neŭtralajn eldonaĵojn ni senpartie resumas. *) ricevebla ĉe U.E.A.

milito. Dummilite li faris aventurajn ĵurnalistajn vojaĝojn al Rusujo, Pollando k.c., kaj renkontis D-ron Zamenhof ses monatojn antaŭ ties morto. Postmilite li fariĝis delegito de Persujo al la Ligo de Nacioj, fondis la radiostacion de Ĝenevo kaj amikiĝis kun mondfamaj figuroj kies favoron al Esperanto li sukcesis altiri.

Praktika homaranismo estis lia vivcelo, kiu kondukis lin al unikaj spertoj. Lia kvieta maniero rakonti pri ĉio ĉi plaĉas al mi kaj mi ĝojas havi la bone presitajn bildojn.

H. W. Holmes (Londono)

Duonvoĉe, poemaro de G. E. MAURA. Dua eld. Stafeto. La Laguna, 1963. 180 p. 19 × 12 cm, kun 3 desegnaĵoj. Serio Beletraj Kajeroj n-ro 19. Prezo: 5,70 gld. (22,8 st).*

*Floru do el ni la agoj,
je l'hazardo de la tagoj,
laŭ nia pov' kaj saĝ'!* (p. 45)

La Nova Testamento enhavas strofon: "...kaj kion vi aŭdas en oreloj, tion proklamu sur tegmentoj". — *Duonvoĉe* diritan de G.E. Maura oni proklamas de sur tegmentoj.

Legantoj de la verko estos kontentaj, ke la enhavo estas bone komprenebla kaj per ĝi oni ne devas turmenti la cerbon, kiel dum solvado de krucenigmoj. Trafoliumante la volumon, pro tro diversspeca enhavo ni konkludas, ke ĉio estas kolektita el tagaj hazardaĵoj, kaj pro tio ĉiu leganto trovas ion por si kaj neniu povas plendi, ke la verko enhavas nenion por li.

Bonhumoruloj amuzas kaj plezurigas sin per kolekto de trafaj pingloj, ekzemple:

*For neologismoj!
Ĉu ne sort' malice puna?
El Kvaropo la plej juna
devis nomiĝi Old.*

De amo frekventitoj, kun avido kaj kaptur-niĝon havante, legas pri amfeliĉo versaĵojn el kiuj kelkaj konsistas nur el aro da biologiaj faroj (1935, p. 37) kaj anatomiaj vortoj (*bedaŭro*, p. 17). Aŭtoro, kiu genuiĝas antaŭ natura belego, ne devas fari tion kun *bedaŭro*.

Kiu povas konkludi, ĉu versaĵo esprimas profundan amaron, ĉu indiferenton, ĉu korforton? Ni trovas plaĉon al — *Skarpo tempo-kolora*. Ĝi kaŭzas bonsenton kaj deziron:

*Eklernu ĝojon kaj amaron
leĝere preni, sen prudent'!* (p. 144)

La parto *Amaro* estas elstaranta kaj iom ĝenanta en la cetera enhavo. Estas apartaĵoj, kiujn oni ne devas diri — "*Duonvoĉe*", ekzemple: *Litanio*, (p. 78). Sed *Jesaja* 53 — malgraŭ tio, ke la aŭtoro pravus, estas ofenda. Entute la verkon oni povus taksii:

— Teren kristale ŝutas alaŭdo
sunpecetojn. (paĝo 159).

Elvira Lippe, (Latvio)

Homoj sur la tero, romano de Stellan ENGHOLM. Dua eld. Stafeto, La Laguna 1963 236 p. 23 × 17 cm., plus 4 bildopaĝoj. Belliteratura serio n-ro 21. Prezoj: bind. 10,65 gld (42,6 st); broŝ. 7,60 gld (30,4 st).*

Stellan Engholm ĝuas grandan bonfamon kiel novelisto, poeto, tradukisto kaj redaktoro. Sed liaj ĉefaj kontribuoj al nia originala literaturo estas liaj romanoj.

Li debutis en la tridekaj jaroj jam kiel tre matura verkisto. Lia unua verko "*Al Torento*" estis eldonita en 1930. Poste de li aperis "*Homoj sur la tero*" (1932), "*Infanoj en Torento*" (1934), "*Vivo vokas*" (1939) k.a. Cetere, li ankaŭ multe tradukis esperanten el la verkoj de Lagerlöf, Strindberg, Heyerdahl, Tagore k.a. Kiel fondinto, eldoninto kaj redaktoro de la ege valora "*Malgranda Revuo*" (1943-1952) li multege kontribuis al nia literaturo kaj malkovris multajn novajn talentojn.

La verkon inaŭguras lia propra poemeto sentitola, represita ĉi tie laŭ la sugesto de lia vidvino S-ino Olga Engholm. La poemo estas kiel enkonduko al la verko kaj kvazaŭ koncizas tion, pri kio temas la romano mem:

*Homo, humile klinu vian kapon!
Estas la tero, kiu vin nutras,
kaj sub la polvo dormas la prapatroj.*

*Homo, humile levu la rigardon
al la sennombraj steloj en la alto!
Inter la steloj ŝvebas nia tero
kiel polvo en senfina spaco.*

La tuta romano estas historio de simpla sveda kampara familio en la daŭro de tri generacioj. Engholm talente kreis siajn geheroojn, donante al ili ĉiuj ne nur konturon kaj figuron, sed ankaŭ la muskolojn kaj vivsangon, tiel ke ili leviĝas antaŭ ni kiel vivantaj homoj. Kvankam ili estas simplaj kamparanoj, ili havas, kiel ni ĉiuj, siajn ĝojon kaj iluziojn. Engholm bonege konis la vivon de la kamparanoj, ĉar li, kvankam naskiĝinte en la sveda ĉefurbo, pasigis grandan parton de sia vivo en la kamparo.

Al la plej belaj ĉapitroj de la libro apartenas liaj priskriboj pri la sopiro de la nepo Eskil al sia mortinta avo. Sekve, Engholm tiel delikate malkaŝis al ni la sekretan amon de Eskil por nekonata knabino. Per la artista talento li belege pentras liajn ĝojon, hezitojn kaj emojn ekscititajn je ilia unua renkontiĝo. La priskriboj de Engholm estas tiel impresaj, ke ni sentas la saman ekscitiĝon dum legado.

Estas ankoraŭ alia rolanto, la plej grava, kiu latentas tra la tuta libro. Ĝi estas la Tero. Estas ĝi, kiu kunligas la tri generaciojn, kvankam ĝi neniam dialogis, nek kun la geherooj, nek kun la legantoj. Tamen ĝi ludas la plej gravan rolon en la vivo de tiu ĉi simpla familio, kiu pro ĝi ĝojas kaj suferas.

En Esperanto malabundas originalaj romanoj, kaj la unuarangaj romanoj estas des pli raraj.

"Homoj sur la tero" estas verko, kiu certe kontentigas la romanamantojn.

Armand Su (Tientsin)

novaj
libroj



Recenzis
Armand
Su

**novaj
libroj**

La surtera paco, encikliko de Papo JOHANO XXIII. Eld. IKUE, Heerlen, Nederlando, 1963. 61 p. 19 × 12 cm., kun frontispico kaj latina antaŭparolo. Serio "Kristana Kulturo" n-ro 3. Prezo: 2,50 gld. (10 st).*

Resumo:

Priskribas la rilatojn inter homoj kaj ŝtatoj en mondo konforma al la Die intencita ordo. Ĉiuj personoj havas certajn ŝtate protekten-dajn rajtojn, i.a. konscienca libero, politika agado, kaj ekonomia sekuro. Ĉiuj nacioj rajtas memstari, sed devas interkonsente malarmi kaj krei mondan potencorganon: nur tiel efektiviĝos paco kaj la komuna bonfarto.

letero

OKAZE DE RECENZO

En sia recenzo pri miaj komentoj al la Fundamento de Esperanto ("E-o", P. 212) S-ro A. W. Rowe deklaras sin ŝokita pro iu eraro, kiun mi estus kulpinta. Fakte ja mi estis ŝokita de lia diro. Efektive mi skribis: "Ne baldaŭ mankos la neplugitaj kampoj al niaj esplorantoj". S-ro Rowe opinias, ke estu: "Baldaŭ ne mankos...". Tio estas tute ne ĝusta: tio prezentus ideon alian, ol tiun kiun mi esprimis; mi neis la baldaŭecon de la manko, ni devos atendi longan tempon antaŭ ol tiu manko sentiĝos. Sed oni ne komprenu, ke ne plu estos manko en la baldaŭeco, kiel sugestas s-ro Rowe; jam nun kaj eĉ jam de longe ne estas tia manko. La adverbo "ne" determinas unualoke la vorton senpere ĝin sekvantan.

Aliparte, responde al la lasta alineo de S-ro Rowe, mi povas informi, ke la subskribinto preparas eldonaĵon pri la Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro kun speciala atento al la Zamenhofa vorttrezoro.

André Albault

**ricevitaj
eldonaĵoj**

Olomouc. Eld. Turista-Ĉedok, Placo de Stalin, Olomouc, Ĉeĥoslovakio, 1963. 16 p. 20 × 14 cm, ilustrita. Pri la urbo kaj ĝia Esperanto-movado.

Hugo Steiner: Vivo en la servo de la popol-interkompreniĝo. Eld. Internacia Esperanto-Muzeo, Wien I, Hofburg, Aŭstrujo. 55 p. 29 × 21 cm. Prezo: 7 rpk.

Esperanto dla wszystkich (Esperanto por ĉiuj) de M. NIEMIROW. Eld. Pola Esperanto-Asocio, Varsovio, 1963. 76 p. 21 × 15 cm. Prezo: 1,50 gld (6 st).

Principoj de la racia muzikskribo, de T. WÓJCIK kaj M. ZALEWSKI. Eld. Pola Esperanto-Asocio, Varsovio, 1963. 20 p. 29 × 21 cm., litografita. Eldonnumero 1.100 ekz. Prezo: 1,— gld (4 st).

Okno na świat (fenestro al la mondo), de T. HODAKOWSKI. Eld. Pola Esperanto-Asocio, Varsovio; 28 p. 29 × 20 cm., multobligita. Lernolibro por junularo.

Esperanto andolon (La Esperanto-movado), de L. SINHA. Eld. Bengala Esperanto-Instituto, Vinaya-Bhavana, Santiniketan, W. Bengal, Hindujo, 1963. 72 p. 18 × 12 cm. Prezo: 75 n.p. (2,5 st).

Bahasa Esperanto, Azas², Perkembangan dan Kemadjuannya (Esperanto, ĝia strukturo, evoluo kaj progresado) de LIEM Tjong Hie. Eld. la aŭtoro, Toko Djohar, Dj. Gadjah Mada 60, Semarang, Indonezio. 32 p. 16 × 12 cm. Prezo: 2 rpk.

Temas pri celtaŭge verkita informa broŝuro kun emfazo sur la rolo de Esperanto por la unuigo de Azio-Afriko. Kvankam la ĉefa teksto estas en lingvo indonezia, koncizaj aldonaĵoj en la ĉina kaj la angla (preskaŭ senerara lingvaĵo) ebligas utiligon ankaŭ por aliaj landoj. Mendebla rekte de la aŭtoro.

La vero kiel la gvidantoj de KPSU alianciĝis kun Hindio kontraŭ Ĉinio. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 48 p. 18 × 13 cm.* Prezo: 0,55 gld. (2,2 st).

Resumo: La redakcio de *Renmin Ribao* respondas al artikolo de 19.9.63 en *Pravda* pri la ankoraŭ nesolvita landlima problemo inter Hindujo kaj Ĉinujo, kaj al la tie prezentitaj kritikoj kontraŭ diversaj aspektoj de la ĉina sinteno al tiu problemo. Estas aldonita traduko de la rusa artikolo.

Propono pri la ĝenerala linio de la internacia komunisma movado, eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 109 p. 18 × 13 cm. Prezo: 0,75 gld. (3 st).*

Resumo:

La enhavon ĉefe konsistigas la responda letero de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio al la letero de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Sovet-unio (14-6-1963). Per 25 tezoj KPĈ eksplikas kaj defendas siajn starpunktojn, kiuj estis kritikitaj de KPSU.

Ago kaj reago, de Francisco Cândido XAVIER. Trad. L. C. Porto Carreiro NETO. Eld. Brazila Spiritisma Federacio, Rio de Janeiro 1963. 233 p. 18 × 12 cm. Romano.

Frazaro Esperanto-Japana, de S. NAKAGAŬA. Eld. Japana Esperanto-Instituto, 1963. 37 p. 14,5 × 8,5 cm.

Svisa Esperanto-Kalendaro 1964. Eld. K. H. Mischler, Franklinstr. 29, Zürich 50, Svisujo. 13 p. 34 × 27 cm, kun koloraj bildoj. Prezo: 11 rpk, inkl. afrankon.

El ĉina fotografia arto. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 112 p. 26 × 23 cm, bindita. Parte kolorpresita. Prezo: 5,30 gld. (21,2 st).

Internacia Elektroteknika Vortaro Esperanta-pola kaj pola-Esperanta. Grupo 10: maŝinoj kaj transformiloj. Verkis mag. inĝ. K. SIWICKI. Eld. Pola Esperanto-Asocio, Varsovio, 1963. 41 p. 21 × 15 cm., litografita. Eldonnumero 600 ekz. Prezo: 1,50 gld (6 st).

Premio Internazionale Scientifico Città di Sanremo. Eld. Nacia Esplor-komitato kaj Kongresoficejo Sanremo, Italujo, 1963. Luksa broŝuro pri internacia scienca premio, en 28 lingvoj, inter kiuj Esperanto.

LAŬLANDE

Bermudo

● En unu privata lernejo komenciĝos en januaro dujara eksperimenta kurso de Esperanto. Okazis jam oficialaj diskutoj pri enkonduko de la lingvo en ŝtatajn lernejojn, kaj okazis ankaŭ ĵurnalaj, radiaj kaj televidaj intervjuoj pri Esperanto.

Britujo

● Regiona instanco pri lernejaj ekzamenoj publikigis preskribojn por mezgradaj ekzamenoj en Esperanto por 1965. La sinteno de la tutlandaj aŭtoritatoj (vidu 1963 p. 172) tamen restas negativa.

Francujo

● Ekspozicion, organizitan de UEA-Delegito M. Delcourt en Tourcoing, vizitis almenaŭ 1000 personoj. Ĝi rezultigis 20 gazetartikolojn, radian kaj televidan elsendojn.

Hungarujo

● Ministroprezidanto Johano Kádár je 28.9.63 donis aŭdiencon al gvidantoj de Hungara Esperanto-Asocio, kiuj donace prezentis al li la Dian Komedion de Dante kaj raportis i.a. pri la Universala Kongreso en Sofio.

● La 1an de oktobro la Ministerio por Popolklerigo publikigis oficialan permeson por instruado de Esperanto en ĝeneralaj kaj mezaj lernejoj ekde la studjaro 1963/4 po du horoj semajne, nedevige. Efektive, jam dum 1962/3 en Hungarujo 39 lernejoj instruis la lingvon nedevige, sed ekster la kadro de la lerneja programo.

Koreujo

● Post stagno rezultinta el la politikaj eventoj de 1960 kaj 1961, nun reviviĝis la agado por la Internacia Lingvo, dank' al prelegoj kaj ekspozicioj organizitaj de Taekeng Kim. Sekve tri lernejoj en Taegu enkondukis Esperanton kiel oficialan elekteblan studon por 1963-4, po du horoj semajne, kaj alia po unu horo semajne. Estas urĝe bezonataj korespondantoj por la lernantoj kaj materialoj por nova ekspozicio en la ĉefurbo Seoul. Adreso: Domo de Esperanto, 104-43 An Am-dong, SEOUL, Suda Koreujo.

Gimnazilernantoj de Esperanto ĉe Templo, Hae In



mallongaj
novaĵoj

Komerca
fako de
ekspozicio
(v. Francujo)

Kuvajto

● Arablingvaj informiloj pri Esperanto eldonas "The Polyglot Language School", Fahad Al Salem St., Kuwait Building, First Floor, Flat 108, Kuvajto.

Nov-Zelando

● Ĉiumonatan kurson presas la plej ŝatata nov-zelanda gazeto por geknaboj, "Junior Digest", kiu havas 18.000 legantojn en Nov-Zelando, Aŭstralio, Fiĝio, k.a. La kurson kompletigas sonbendo de ĝusta prononcado, kiun la kursanoj povas ricevi de la ŝtata eduka fako.

LAŬFAKE

Gastronomio

● La firmao Bénédicte eldonis internacie uzeblan menukarton kun 90 eroj en kvin naciaj lingvoj kaj Esperanto.

Instruado

● Ĉiam plimultiĝas gazetoj eldonataj de aŭ por infanoj. Krom la konataj rondoj de "Grajnoj en Vento", multobligitajn gazetojn kun allogaj kovriloj eldonas ankaŭ infanaj rondoj en Gdańsk (Pollando) kaj Bjelovar (Jugoslavio). Vere taŭgan enhavon prezentas la geknaba bulteno de SAT: "Nia Voĉeto" (Jarlibro p. 156) kaj la nova gazeto de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj: "Planteto" (adreso: Pispalanharju 13, Pispala-Tampere, jarabono 9 steloj).

Ornitologio

● Jarkunvenis la Ornitologia Rondo Esperantlingva en vilaĝo Sint-Job-in-'t-Goor en Belgujo. Nova sekretario estas S-ro L. Bechtold, Hessische Forstamt, 3568 Gladenbach, Germanujo. La Rondo intencas eldoni duonjaran organon ekde 1964.

Radio

● En japanlingva servo de Voĉo de Ameriko okazis kvaronhora intervjuo kun S-roj Deguĉi kaj Umeda, partoprenintoj de la Sofia Kongreso, pri iliaj spertoj kaj pri la Internacia Lingvo ĝenerale. Revenante al sia hejmlando ili jam prelegis kaj muzikis en tre multaj diverslandaj Esperanto-grupoj.



49-a UNIVERSALA KONGRESO

DE ESPERANTO

Den Haag, 1—8 Aŭgusto 1964

Sub la Alta Protektado de Sia Moŝto Juliana, Reĝino de Nederlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 6 Rotterdam, la 10-an de jan. 1964

Foto-Konkurso.

Ekstra Gevaert-Premio: 400,— ned. gld.

kaj medalo

Unua Premio: 150,— ned. gld.

Dua Premio : 100,— ned. gld.

Tria Premio : 50,— ned. gld.

Ekstra Junulara Gevaert-Premio (rezervita al gejunuloj ĝis 25-jaraj): 200,— ned. gld. kaj medalo.

La fotoj estu nur blank-nigraj. La formato estu minimume 13 × 18 cm. Ĉiuj konkursaĵoj estu senditaj al la konstanta adreso de la 49-a U.K. plej malfrue la 1-an de julio 1964.

En la kadro de la 49-a U.K. kaj de 20-a I.J.K. okazos ekspozicioj de la plej bonaj fotoj.

La premiitaj fotoj apartenos al U.E.A. kaj aperos en "Esperanto", "Monda Kulturo" kaj "Kontakto". (Vidu ankaŭ p. 14)

INTERNACIA EKZAMENO

La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos en Hago (30-31/7/64). Povas esti allasita nur persono, kiu sukceso finis per diplomo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu persono, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi, kiel eble plej frue (limdato la 1-a de majo), al la sekretariino de I.E.K.: esperantlingvan tradukon de la diplomo pruvanta, ke la kandidato finis mezlernejon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco) kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo. La kotizo por la ekzameno estas du usonaj dolaroj (7,20 gld) aŭ ekvivalento, kaj

9-a INTERNACIA INFANA KONGRESETO

Celo: La infana kongreseto, kiel konstanta institucio de la Universala Kongreso, celas eduki infanojn al internacia amikeco per aplikado de la komuna lingvo Esperanto. La Kongreseto daŭrigas la ekzemplan kaj la etoson de la Esperantistaj familioj, kiuj en la ĉiutaga vivo uzadas la Internacian Lingvon. La kongreseto ne estas lingva seminario: do, ĝi ne akceptas infanojn, kiuj ne povas memstare paroli en Esperanto. Ĝi ne estas infanĝardeno aŭ vartejo, en kiu trookupitaj kongresanoj lasas siajn infanojn. Ĝi estas edukejo, kie la esperantistaj etuloj ekde la fruaj jaroj spertas en atmosfero de festa sed disciplinita libereco, internacian komunan vivon kaj tutmondan solidarecon, preter rasaj, naciaj, religiaj kaj aliaj apartigoj. La Kon-

Infana Kongreseto.

Ni atentigas la interesigantojn ke la Loka Kongresa Komitato estas devigita limigi la nombron de la aliĝoj al la 9-a Internacia Infana Kongreseto. Pro tio ĝi instigas al kiel eble plej baldaŭa aliĝo. Aliĝiloj kaj informoj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la 49-a U.K. (Infana Kongreseto).

Karavano.

Anoncis flugkaravanon S-ro Joel Vilkki, Somero, Finnlando.

Statistiko (ĝis 31-12-1963).

Argentino 1, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 15, Belgujo 23, Brazilo 2, Britujo 128, Bulgarujo 295, Centra Afrika Respubliko 1, Ĉeĥoslovakujo 10, Ĉilio 1, Danlando 31, Finnlando 29, Francujo 172, Germanujo 90, Hispanujo 10, Hungarujo 65, Indonezio 1, Israelo 2, Italujo 33, Japanujo 6, Jugoslavio 50, Kuvajto 1, Madagaskaro 1, Malio 1, Monako 5, Nederlando 245, Norvegujo 11, Nov-Zelando 1, Pollando 111, Portugalujo 1, Sovetunio 1, Svedujo 72, Svisujo 13, Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko 8, Venezuelo 2.

Entute 1441 el 35 landoj (Pasintjare 1069 el 33 landoj).

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

devas esti pagita samtempe. Kandidato, kiu pro registaraj reguloj absolute ne povas antaŭpagi la kotizon, sed kiu vere atendas ĉeesti la Kongreson, konsultu la sekretariinon, kiu konsideros la eblecon de speciala aranĝo.


Akceptitaj kandidatoj ricevos specimenajn demandarojn kaj pli detalajn informojn.

Laŭ la Regularo de IEK, sukceso en la ekzameno devas "atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo". Kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diplomo. Sekretariino: F-ino Marjorie Boulton, 1 Inglefield Avenue, High Lane, Burslem, Stoke-on-Trent, Staffs., Anglujo. Informpetantoj bonvolu sendi int. respond-kuponon.

greseto celas kuraĝigi la esperantistajn familiojn instrui Esperanton al siaj infanoj, krei kontakton inter la diverslandaj infanoj, kiuj jam konas la Internacian Lingvon, kaj montri al la neesperantistoj la servojn de Esperanto por pli bona internacia kompreniĝado.

Datoj: La Infana Kongreseto okazos de sabato, la 1-a de aŭgusto, je la 8-a h. ĝis sabato la 8-a de aŭgusto, je la 12-a h. Lasta limdato por aliĝi estas la 30-a de junio 1964. La nombro de la infanoj estas limigita.

Kondiĉoj: La Infana Kongreseto estas nepre rezervita al infanoj de 6 ĝis 13 jaroj, kun eventualaj esceptoj en specialaj kazoj. En la pasintaj jaroj aliĝis infanoj kun nesufiĉaj lingvokonoj, kiujn LKK devis rifuzi eĉ post la komenciĝo de la Kongreseto. Por eviti tion



Kanalo, ponto, tradiciaj fasadoj: tiel atendas vin la kongreslando en 1964.

LKK decidis akcepti la aliĝon nur se minimume du esperantistoj (ne la gepatroj) atestas pri la bona lingvoscio de la infano. Laŭ ebleco, la infanoj estos dividitaj en grupojn laŭ aĝo kaj miksitaj en diversnaciajn "familiojn".

Kotizoj: Kontribuo al la restadkosto estas fiksita je 42 ned. gld. (168 steloj) pagendaj samtempe kun la aliĝo. Du aŭ pluraj infanoj el la sama familio pagas po 37 ned. gld. (148 steloj). Laŭ la ebleco, limigita nombro da infanoj estos invitita per la fondaĵo "Adoptaj Gepatroj". La Universala Kongreso subven-

cias sian Kongreseton kaj kovras ties deficiton.

Gvidantoj: La infanoj estos prizorgataj de pedagogie spertaj komisiitoj el diversaj landoj.

Vizito: Merkredon, la 5-an de aŭgusto, la Kongreseto akceptas gepatrojn, pedagogojn, ĵurnalistojn kaj ĉiujn interesitajn kongresanojn. Dum la vizito okazos informa prelegeto, sed neniuj aparta programo. Ekster tiu tago, nur la gepatroj, korespondantaj geonkloj, legitimaj edukantoj rajtas viziti la infanojn inter la 19-a kaj 20-a h. **Prezentado:** La infanoj prezentos programon vendredon, la 7-an de aŭgusto.



la juna vivo

LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
Ivo Osibov, Splitskog odreda 15, SPLIT, Jugo-
slavio.**

ANKORAŬ UNU SEKCIO

La Jaron de la Junularo ni komencis kun tri novaj junularaj sekcioj landaj, en Belgujo, Japanujo kaj Usono. Dum la daŭro de la Jaro fondiĝis ankoraŭ unu — la aŭstra. Nur unu semajnon antaŭ la Jarfino atingis nin denove ĝojiga novaĵo — landa sekcio ekzistas nun ankaŭ en Hungarujo.

Unu el la celoj de la Jaro de la Junularo en la Esperanto-Movado estis plilarĝigi la agadon ankaŭ al la landoj kie junularaj sekcioj ne ekzistas. La kampanjo alportis kvin novajn junularajn landajn organizaĵojn, per kio TEJO atingis entute 17 landajn sekciojn en: Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Bulgarujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Madagaskaro, Nederlando, Polujo, Svedujo, Svislando kaj Usono. Se al tio ni aldonas reaktiviĝon de la junularo en Danujo, personajn kontaktojn, kiujn starigis funkciuloj de TEJO dum la kongresoj en Vraca kaj Sofia kun junularaj reprezentantoj el Ĉeĥoslovakujo, Gvineo, Malio, Rumanujo kaj Sovetunio kaj unuajn reeĥojn el Aŭstralio kaj Koreo, ni povas aserti ke TEJO dum la unua larĝskala kampanjo, kiun ĝi entreprenis, preparis tre fidindan bazon por pluaj, ankoraŭ pli rapidaj firmiĝo kaj evoluo.

Jen kion skribas al ni la plej nova sekcio:

"Kun ĝojo ni sciigas al vi, ke la Estraro de HEA aprobis la organizon de la Hungara TEJO-Sekcio. Ĝi funkcios kiel Junulara Fakkomisiono de HEA kaj ĝia centro estas en Budapeŝto. Momente la Sekcio nombras jam pli ol 200 anojn kaj venos ankoraŭ pli multaj gejunuloj.

Por krei viglajn kontaktojn kun alilandaj TEJO-sekcioj la estraro de nia junulara organizaĵo decidis organizi Internacian Junularan Esperanto-Feriosemajnon ĉe nia bela "Hungara Maro" Balaton proksiman jaron, de la 9-a ĝis la 20-a de Julio.

Konsiderante ke nia TEJO-sekcio estas nova organizaĵo — kaj pere de la okazigo de la planata Feriosemajno ni deziras krei la bazon de nia venonta agado — ni bezonas la kolektivajn helpon de la internacia junularo.

Pro la preferata situo de la feriejo Fonyód-Bélatelep, jam en Februaro ni devas klopodi ĉe la koncerna turisma oficejo rezervi lokojn bezonotajn por la partoprenantoj — sekve ni petas sendi vian anticipan sinanoncon ĝis la fino de Februaro 1964.

La prezoj de la 12-taga feriosemajno estas:
en 2-persona tendo kun trifoja tage manĝo 23,50 US dolaroj
en 4-persona tendo kun trifoja tage manĝo 23,00 US dolaroj
en turista loĝejo kun trifoja tage manĝo 19,00 US dolaroj

La prezoj estas pageblaj — laŭ la oficiala kurzo — egalvalore per kia ajn valuto laŭ la financaj reguloj de la propraj landoj ĉu ĝirite al Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, ĉeko OTP 10.005-VIII-1, ĉu permane en Hungarujo.

Al la interesigantoj — post la alveno de iliaj anticipaj sinanoncoj — ni sendos detalajn informojn kaj aliĝfolion.

Ni esperas, ke la internacia junularo evidigos sian solidarecon al la hungara TEJO-sekcio kaj apogos ĝin per multnombra partopreno en Hungarujo.

La hungara TEJO-sekcio."

"KONTAKTO" POR LERNEJANOJ

Dum tiu ĉi monato aperos la unua regula numero de nova kvaronjara junulara revuo en la Internacia Lingvo — "Kontakto". Ĝin eldonas TEJO. La kutima jara abonkotizo estas 32 steloj aŭ 8 guldenoj. Sed por liveri taŭgan legmaterialon al lernejoj kiuj lernas Esperanton kaj por doni al ili konscion pri la ekzisto de la junulara Esperanto-Movado, TEJO pretas disponigi la revuon al lernejoj kontraŭ jarkotizo de 10 steloj aŭ 2,5 guldenoj. "Kontakto" taŭgas precipe por pli aĝaj lernantoj (14-jaraj kaj pli) kaj por, ekzemple, anoj de instruistaj seminarioj.

Tiaj abonantoj devas esti lernantoj de Esperanto en oficiala kurso de iu lernejo. Oni devas samtempe pagi minimume 10 abonojn kaj sendi atestilon sur oficiala skribpapero de la koncerna lernejo, kun informo ke ili estas destinitaj al oficiala Esperanto-klaso en tiu lernejo kaj kun subskribo de la koncerna respondeca persono. Ne estas eble disponigi ekzemplerojn je ĉi tiu favora prezo al neoficialaj aŭ nelernejaj klasoj. Ĉiuj ekzempleroj por unu lernejo estos kune ekspeditaj en unu pakaĵo.

Individuajn numerojn oni povas liveri laŭ la samaj kondiĉoj kontraŭ prezo de po 3 steloj por unu ekzemplero.

Estas havebla la provnumero de "Kontakto" kun pluraj interesaj artikoloj kaj ilustraĵoj.

Por ĉiuj informoj skribu al "Kontakto", F-ino Elly Wijnands, Postweg 48, Soesterberg, Nederlando.

PRELEGO PRI ESPERANTO EN ARABA LINGVO

La 26-an de Septembro en la sidejo de la Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb s-ro Ali Azmi Samara el Sudano prelegis en araba lingvo pri la problemoj de adopto de internacia lingvo kaj ĝia neceseco por Afriko. La diskutado kiu sekvis kun arabaj studentoj de la Zagrebaj fakultatoj estis tre vigla. La ĉeestintoj ricevis la seslingvan informan flugfolion de UEA kaj la seslingvan alvokon de STELO al ĉiuj universitatoj, krome ankaŭ la specialan Afrikan numeron de "Tamen" de kiu Pola Esperanto-Junularo bonvolis disponigi al la Zagreba SEK necesan kvanton.

La klubo planas post kelka tempo ripeti la prelegon de s-ro Ali Azmi Samara por nove alvenintaj arabaj studentoj kaj verŝajne ankaŭ prelegojn en la franca kaj angla por aliaj Afrikanoj en la kadro de speciala agado. (Laŭ Bulteno de SEK, Zagreb).

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la januaran numeron.

Radio Roma. 4-II, Tra la literaturo; 7-II, Karnavalo en Italujo; 11-II, Novaĵoj el Italujo; 14-II, Romaj kasteloj: Castel Gandolfo; 18-II, Italaj kanzonoj en Esperanto; 21-II, Italujo kaj fremdaj verkistoj: Cervantes; 25-II, Leterkesto; 28-II, Grandaj italaj komponistoj: G. Donizetti. Krome, ĉiun merkredon: Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja (marde kaj merkrede), kaj Prof. D-ro Vincenzo Mussella (vendrede).

Pola Radio anoncas novan konkurson okaze de la 20-a datreveno de la kreiĝo de Popola Pollando. Tuj petu la regularon al Pola Radio, Konkurso de la 20-a jaro, Varsovio, Pollando. Respondojn oni povas sendi ĝis la 15-a de februaro.

**esperanto
en radio**

Gvatemala Radio nun elsendas sabate de 16.00 ĝis 16.30. Samaj ondlongoj. La programo konsistas el informoj kaj kurso. La preleganto, D-ro Jules Bonge, ankaŭ parolas hispanlingve pri Esperanto ĉiun dimanĉon de 02.30 ĝis 02.45 GMT ĉe la stacio Radio Faro Aviateca per ondoj 400 m. (750 kcs), sub la titolo: "Esperanto, vivanta lingvo".

Marto

1 Kunveno de Svisa E-Soc., Lausanne
29-30 Argentina Kongreso en Florencio Varela
30-5/4 Kultura semajno Grésillon
31 Kotizoj UK Hago, IJK Amsterdam altiĝos

Aprilo

30 Limdato Int. Ekzameno (p. 34)

Majo

9-15 IFEF-Kongreso en Bruselo
15-18 Brita Kongreso en Bridlington
16-18 Germana Kongreso en Soltau
Franca Kongreso en Parizo
Belga Kongreso en Liège
31 Limdato Belartaj Konk. (p. 173, 222)

Junio

26-28 Kanada Kongreso en Ottawa
30 Limdato aliĝo 49-a U.K. Hago

Julio

2 Sezono Grésillon komenciĝas
3-5 Usona Kongreso en Nov-Jorko
5-8 Tria Somera Universitato, Gyula, Hung.
5-9 Jugoslavia Kongreso, Rijeka, Kroatio
9-20 Int. Junulara Kunveno, Balaton, Hung.
11-14 Gen. Kunveno de INOE, St. Chéron, Franc.
23-28 Hispana Kongreso en Valencia
23-29 IKUE-Kongreso en Valencia
25-31 SAT-Kongreso en Narbonne
25-1/8 KELI-Kongreso, Lunteren, Nederl.
30-1/8 Antaŭkongreso en Bruselo (p. 216)

Aŭgusto

1 UK-kotizoj por Tokio plialtiĝos
1-8 49-a Universala Kongreso, Hago
8-12 Postkongreso en Leeuwarden (p. 216)
9-17 Int. Ferioj, Krommenie, Ned. (p. 20)

**memoriga
kalendaro**

KUN ĜOJO

Kun ĝojo mi konstatis, komparante la ciferojn de 31.12.63 kun tiuj de 31.12.62, ke UEA nun havas 1.523 pliajn membrojn. La nombro de asociaj membroj estas 1.236 pli, kaj estas 287 pliaj individuaj membroj. Mi tuj aldonu, ke inter tiuj pliaj individuaj membroj estas 191 pliaj MA kaj MS kaj 98 pliaj Dumvivaj Membroj. La nombro de la individuaj membroj (7.440) estas la plej alta de post 1957 (7.542), kaj la suma membraro (33.832) estas nova rekordo.

Mi aparte ĝojas pri la granda nombro de DM (533). Ĝi montras, ke oni havas fidon ne nur je la nuna UEA, sed ankaŭ je ĝia estonteco. Ĉu la nombro de la membroj kaj precipe la nombro de la individuaj membroj povos denove kreski en 1964, malgraŭ plialtigo de la kotizoj ekde 1.1.64?

Mi kredas ke jes, ĉar:

a) la interesiĝo pri nia solvo de la lingva problemo ĉie en la mondo kreskas,
b) mi atendas multajn junajn membrojn pro la nova aranĝo inter UEA kaj TEJO, pri kiu la estraro de TEJO estas tiel kontenta,
c) la kotizo de 20,— ned. gld. por MA ne estas tre alta kompare kun tio, kion oni ricevas. Jam en 1952 la kotizo por MA, kiam la revuo estis nur malgranda kaj la jarlibroj multe

malpli dikaj, estis 10,— ned. gld. Mi estas certa, ke en 1964 multegaj el ni havos pli ol duoblajn enspezojn kompare kun 1952.

Mi dankas ĉiujn el vi, kiuj en pasinteco helpis altiri pliajn membrojn al UEA, kaj petas ilin — kaj la aliajn — daŭrigi tiun laboron en 1964.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj.

**oficiala
informilo
n-ro 365
1 jan. 1964**

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de decembro 1963 kaj ankaŭ por komparo je la fino de decembro 1962.

	1962	1963
Asociaj membroj	25.156	26.392
Individuaj membroj		
MJ	842	859
MA	5159	5328
MS	463	479
Pat.	1	1
DM	435	533
HM	40	39
J-MJ	48	30
J-MA	165	171
	7.153	7.440
Entute	32.309	33.832

**esperanto
februaro
1964 37**

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1963

Stato je la 31-a de decembro

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Finnlando	2570	3160	122,96
2. Belgujo	1695	2055	121,24
3. Nederlando	5068	5975	117,90
4. Svislando	2141	2459	114,85
5. Japanujo	3240	3690	113,89
6. Usono	4110	4526	110,12
7. Svedujo	6640	7180	108,13
8. Francujo	7225	7752	107,29
9. Danlando	2936	3099	105,55
10. Britujo	6368	6691	105,07
11. Jugoslavio	5180	5375	103,76
12. Norvegujo	1755	1755	100,—
13. Italujo	4220	4210	99,76
14. Germanujo	7221	7141	98,89
15. Hispanujo	2696	2660	98,66
16. Brazilo	3856	3694	95,80

Konkurso II

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Nov-Zelando	1167	1481	126,91
2. Aŭstralio	1233	1475	119,63
3. Kanado	769	842	109,49
4. Israelo	460	460	100,—
5. Aŭstrujo	1475	1430	96,69
6. Madagaskaro	250	236	94,40
7. Portugalujo	515	485	94,17
8. Argentino	905	810	89,50
9. Islando	250	215	86,—
10. Urugvajo	250	135	54,—
11. Sudafriko	250	135	54,—

Ne estas mirige ke venkis en la Unua Konkurso Finnlando, kiu dum la tuta jaro troviĝis ĉe la pinto.

En la Dua konkuris en la fina periodo Aŭstralio kaj Nov-Zelando, kiu lasta lando tamen venkis. Tio estas des pli rimarkinda, ĉar ankaŭ en 1961 Nov-Zelando gajnis la Duan Konkursan.

Al ambaŭ venkintaj landoj ni esprimas nian plej varman gratulon kaj ni dankas al iliaj energiaj ĉefdelegitoj, kaj aliaj varbintoj. Je dispono de ambaŭ estas libropremio en la valoro de po 100,— ned. gld.

La granda plimulto de la aliaj landoj en la Unua Konkurso superpasis 100%. En la lasta tempo okazis ankoraŭ sufiĉe multaj ŝanĝoj en la sinsekvo, kio sendube ŝuldiĝas al pli aŭ malpli intensa varbado de dumvivaj membroj

en kelkaj landoj.

Niaj atendoj esprimitaj lastjare koncerne Belgion plenumiĝis. Se en 1962 ĝi finis kiel lasta, nun ĝi saltis al la dua loko je procento tre proksima al tiu de la gajninto. Ni tre dezirus instigi Brazilon, nun troviĝantan en la fino, sekvi tiun ekzemplon kaj streĉi fortojn por grimpi supren dum la nuna jaro. Por lando kiu iam venkis dum tri sinsekvaj jaroj tio devus esti ebla!

En la Dua Konkurso partoprenas kelkaj landoj kun malfacilaĵoj pro malforta movado, ŝanĝiganta valuto ktp. Se ne multaj atingis 100%, ne signifas ke iliaj gvidantoj ne energie laboris. La sudafrika ĉefdelegito komence de la jaro elmigris el la lando kaj certe tio estas la kaŭzo de ĝia lasta loko en la konkurso. Nun nova funkciulo estas trovita kaj ni havas grandajn esperojn pri alta loko de Sud-Afriko en la fino de 1964.

Intertempe en ĉiuj landoj oni jam estas streĉanta la fortojn por nova varbado. En la momento kiam ni skribas tiujn ĉi liniojn, komence de januaro, ni jam povas konstati ke tre kontentige alvenadas la nunjaraj kotizoj malgraŭ la plialtigo de la tarifo. Tiu plej unua periodo jam estas nia mezurilo por la tuta jaro. Evidente, la grandega plimulto de la membroj komprenas la novajn kotizojn kiel adapton al la hodiaŭa kosto-prezonivelo en la tuta mondo kaj aprezas, ke tiel longe oni povis profiti je la malaltaj prezoj en Nederlando. Do, varbantoj niaj, antaŭen kun fido!

La Novaj Konkursoj

La konkursoj 1964 okazos laŭ la kutima sistemo. La atingita nombro de poentoj en la fino de 1963 estas la kvoto por 1964, kun minimumo de 250. En Konkurso I partoprenas landoj kun pli forta, en Konkurso II landoj kun malpli forta movado. La poentoj estas donataj laŭ jenaj valoroj: AM = 1 poento; MJ kaj J-MJ = 5 pt; MA, MA-K kaj J-MA = 10 pt; MS = 15 pt; Pat kaj DM = 50 pt.

Ni firme fidas je niaj kunlaborantoj. Oni varbu ne nur novajn anojn, sed klopodu revarbi ankaŭ malnovajn, kiuj ial ĉesigis la membrecon en la lastaj jaroj. Helpu plifortikigi la Asocion, por ke ĝi povu ĉiam pli sukcese agadi en la ekstera mondo!

Grandajn rezultojn al ĉiuj deziras.

M. H. Vermaas,

Direktorino C.O.



INTERNACIA AVIADILA KARAVANO AL TOKIO

Aldone al la informoj troviĝantaj sur paĝo 222 de la decembra numero de la revuo "Esperanto", ni informas, ke komence de januaro estis dissendita al ĉiuj enskribitaj kongresanoj loĝantaj en Eŭropo cirkulero kun plenigenda demandaro resendenda al la C.O. Surbaze de tiuj respondoj ĉio estos definitive fiksita.

Oni nepre anoncu sin por la vojaĝo antaŭ la 1-a de marto 1964. Ni antaŭvidas ke la aviadilo estos baldaŭ plenigita. Nur se sufiĉe granda nombro da pliaj vojaĝantoj estos anoncinta

sin, estos eble fari paŝojn por dua aviadilo.

Decidu nun!

Ĝis la 16-a de januaro jam aliĝis al la Universala Kongreso en Tokio 259 personoj el 35 landoj.

NOVJARA DANKO

Kiel ĉiujare, ankaŭ je la fino de 1963 alvenis amaso da bondeziraj kartoĵoj kaj leteroj el ĉiuj partoj de la mondo al la oficejoj de UEA en Rotterdam kaj de CED en Londono. Nome de ambaŭ centroj ni esprimas plej korajn dankojn kaj bondezirojn por 1964.

CEFDELEGITO SUDAFRIKO

S-ro C. Beckford, P.O. Box 10516, Johannesburg.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Allen-Smith, S-ro H. W., Watford, Britujo;
Burgler-Jezsó, S-ino E., Amsterdam, Nederlando;
Carlén, S-ro Frank, Hällabrottet;
Carlsson, F-ino Magda, Rimbo, Svedujo;
Doris, S-ino Gretchen, Tampa 9, Usono;
Favén, S-ino Heljä, Oulunkylä, Suomio;
Fielding, S-ro C., Bristol 6, Britujo;
Fjordland, S-ro Sture, Hägersten, Svedujo;
Giessner, S-ro Joachim, Elze, Germanujo;
van der Graaf, F-ino M. C. J., Dordrecht, Nederlando;
Knapstein, S-ro Bruno, Köln-Klettenberg, Germanujo;
Massemin, S-ro M., Fissac-Ruelle s/Touvre, Francujo;
McGifford, F-ino E. F., Addington, Novzelando;
van Nienes, F-ino W. C., den Helder, Nederlando;
Raulo, S-ino Soili, Munkkivuori, Suomio;
Raumavirta, S-ro Simo, Lauttasaari, Suomio;
Rétot, S-ro Maurice, Paris 20, Francujo;
Seppälä, S-ro Unto, Voikka, Suomio;
Spruch, D-ro Christine, Krefeld;
Strauss, S-ro Hans Georg, Opladen, Germanujo;
Van Hill, F-ino B., Largo, Usono;
Vilkki, S-ro Juhani, Karjaa, Suomio;
Vilkki, S-ro Simo, Turku, Suomio;
de Vries, S-ro J., Groningen, Nederlando;
de Vries-Kanning, S-ino L., Groningen, Nederlando;
Wells, S-ro J. C., London, Britujo;
Wijngaarden, F-ino S. van, Rotterdam, Nederlando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1964

18. Kemp, F-ino F. H., Kew;
19. Taylor, S-ro Frank, V. Melbourne, Aŭstralio;
20. Beaumont, S-ro B. B., Fartown;
21. Boatman, S-ro Douglas P., Westcliff-on-Sea;
22. Clarke S-ro W., Dunfermline;
23. Dunbar, S-ro Robert, London S.E. 5;
24. Freeborn, S-ro S., Morden Park;
25. Kennedy, S-ino M., Bishop Auckland;
26. Miller, S-ro J. R., Stone;
27. Murray, S-ro R. Thorpe Bay;
28. Ryan, S-ino Jane S., Manchester;
29. Shield, W. J., Birkenhead;
30. Zeiner, S-ro B. R., Barry, Britujo;
31. Hansen, E., Kopenhago;
32. Jensen, S-ro H. E., Toustrup;
33. Kehlet, S-ro Torben, Helsingør, Danlando;
34. Llech-Walter, S-ro R., Perpignan;
35. Pera, S-ro Jean, Grenoble;
36. Romand, F-ino Andrée, Paris XV, Francujo;
37. Gieseler, S-ro Walther, Berlin, Germanujo;
38. Blöndal, S-ro Björn, Hvammstanga, Islando;

39. Salberg, S-ro Erik, Primošten, Jugoslavio;
40. Coppens-Bink, S-ino A. B. M., Rotterdam-4,;
41. Holleman, S-ro J. V., Groningen;
42. Leenhard, S-ro A. A., Bussum;
43. Mast, S-ro J. L., Amsterdam;
44. Veenstra, S-ro H., Amsterdam W;
45. Verloren van Themaat, D-ro W. A., Amsterdam-10;
46. Wekker, F-ino E., Amsterdam, Nederlando;
47. Almén, S-ro Helmer, Bromma;
48. Andersson, S-ro Hjalmar, Arboga;
49. Andrén, S-ino Ester, Malmö V;
50. Bjorklund, S-ro F., Floda;
51. Brandemar, S-ro Nils, Stockholm Sö;
52. Dahl, S-ro Einar, Uddevalla;
53. Frode, S-ro O., Göteborg;
54. Johansson, F-ino E., Hedemora;
55. Julin, S-ro Teodor, Stockholm Sö;
56. Karlsson, S-ro Henrik, Kisa;
57. Lagerkrantz, S-ro L., Falun;
58. Lidell, S-ro Ville, Uddevalla;
59. Lind, F-ino Estrid, Stockholm Ö;
60. Lundquist, F-ino Gurli, Ystad;
61. Moberg, S-ro Karl J.;
62. Möllestad, S-ro Sven, Kramfors;
63. Ohlsson, F-ino Ester, Lund;
64. Olsson, S-ro HJ., Stockholm, VA;
65. Rytenberg, Ing. Eugen, Uppsala;
66. Stenström, F-ino Signe, Broddarp;
67. Tell, S-ro Leander, Norrköping;
68. Westman, S-ro Adolf, Leding Björna, Svedujo;
69. Culbert, D-ro Sidney S., Seattle 5;
70. D'Estries, S-ino Madeleine, Bay Shore, L.I.;
71. Dormont, S-ro Louis, Brooklyn 3;
72. Franke S-ro WM. J., Rensselaer;
73. Gilfillan, S-ro S. C., Pasadena;
74. Lieberman, D-ro E. James, Bethesda;
75. Lucero, S-ro Frank S., San Carlos;
76. Lyon, S-ro Charles A., Rochester;
77. Culbert, S-ino Ruth L., Tacoma;
78. Oehler, S-ino René, Milford;
79. Okun, S-ro Abraham H., Monticello;
80. Regal, S-ro Arthur, Downers Grove;
81. Rubinstein, D-ro Robert I., Brooklyn, Usono.

FONDAJO ZAMENHOF

S-ro Martin Gründler,, Germanujo: 9,02 gld.

FONDAJO CANUTO

S-ro Erich Richter, Germanujo: 7,14 gld.

DONACOJ GENERALA KASO

F-ino J. J. van Thiel, Nederlando: 19,75 gld.
S-ro Edmond Gilliard, Svisujo: 248,44 gld.
(memore al sia forpasinta frato Jules, kiu per Esperanto "trovis grandajn ĝojojn kaj ligis multajn daŭrajn amikecojn").

FONDAJO JUNULARA GAZETO

S-ro Vicente Marin, Hispanujo: 12,— gld.
Entute: 585,22 gld.
Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

oficiala
informilo

anoncetoj

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA (adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo) kiu peras adresojn laŭ la regularo aperinta en Jarlibro 1963.

Informojn pri la katolika religio oni povas senpage ricevi de la Internacia Katolika Informejo, Sekretariejo: Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Folioj el la Bildolibro de Dio. Poezia verko en kiu i.a. amplena priskribo de transiro inter tago kaj nokto bele ilustras la idealan manieron de renkonto inter du homoj. (90 paĝoj. Formato 13 × 19 cm. Fortika verda tolkovrilo kun ora surpriso. Prezo 6.50 d.kr.) Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

D-ro Alfredo Ascanio (Ekonomiisto), anoncas al siaj estimataj amikoj, ke li ne povas ĝustatempe respondi la afablajn leterojn ĉar li vojaĝas ankoraŭ malproksime de la hejmo. Ĉiukaze li ne senkuraĝigos, sed baldaŭ skribos ilin. Apartado 3835, Caracas, Venezuelo.

Deziras korespondi: 45-jara F-ino Magrethe Hansen, Rylevej 331, Silkeborg, Danujo; 19-jara F-ino Bente Østergaard, "Hotel Dania", Silkeborg, Danujo; 19-jara F-ino Birgit Karlsson, Ansvej 28a, Silkeborg, Danujo. Ĉiuj komencantoj, nepre respondos.

Internacia movado "Amnestio" klopodas helpi ĉiujn, kiuj kontraŭ la esenco de art. 18 kaj 19 de la Un. Dekl. pri Homaj Rajtoj estis malliberigitaj. Informoj en Esperanto ĉe C. van der Vlies, Statenweg 123c, Rotterdam-4, Nederlando.

Gelernantoj de la Teknikumo en Ruse, Bulgario (14-18-jaraĝaj) dez. koresp. kun personoj el la tuta mondo. Leteroj al sinj. M. Iliev, Vela Piskova 28, Ruse 2, Bulgario.

Esperanto-gekursanoj 12-25 jaraj el internacia lernejo deziras korespondi kun ĉiuj landoj, precipe kun tiuj el orienta Eŭropo kaj ekster Eŭropo. Respondo garantiata. Skribu amase al G. Cool, "École d'humanité", Golderd (B.O.), Svislando.

16-jara komencantino serĉas korespondamikojn (16-25-j.) Sirpa Neuvonen, Torsansalo, Laikko, Finnlando.

Oskar Berman, faka delegito de U.E.A. por ĵurnalismo, kun edzino Doria, 49 Tarna Str., Hadera, Israelo, demandas landajn asociojn en la tuta mondo: kiu aranĝos persipan karavanon al la 50-a Universala Kongreso de Esperanto en Tokio, Japanujo? Bonvolu respondi al ni. Antaŭen dankon kun varmaj amikaj salutoj el Israelo.

Dum la jaro 1964 okazos kelkaj internaciaj kongresoj nome: The International Fancy Goods Fair, The International Police Association, triennial Congress. La Esperantistoj de Blackpool multe deziras fari kontakton kun alilandanoj. Se Vi partoprenos kongreson en nia urbo skribu al S-ro J. Ingham, 73 Woodland Grove, Blackpool, Anglujo.

Esperanto-Civito. Kunveno antaŭvidita en Hago; vin anoncu al D. Soleo, 14B Castle Avenue, Dover, Britujo. Dume mendu (po 2 rpk) (a) novan 10-paĝan bultenon, "Amboso Tintanta", (b) gvidlibron pri Dovro en Esperanto.

Ĉu vi posedas kolorajn lumbildojn (diapozitivojn)? Mi posedas kolekton kun 100 pecoj. Mi estas preta interŝanĝi prunte mian kolekton kun iu ajn esperantisto aŭ grupo. Sendu nenion, unue skribu. Mi deziras fiksi unujaran interŝanĝprogramon. S-ro Rafael Ayala Gómez, str. Cartagena, 353, 6º, 1a, Barcelona-13, Hispanujo. La anonco validas ĉiam.

Diapozitivaj: Jam 100 kluboj en la mondo prelegas uzante niajn diapozitivojn. Kaj vi? Informas: Lentaigne, 3 Gaillarde, Montpellier, Francujo (nur por pagipovaj landoj).

LASTMOMENTE


MONDA KULTURO. Pro surpriso de la redakcio de Monda Kulturo, D-ro A. Albault devis prokrasti respondon de multaj leteroj: li petas komprenemon kaj paciencon de siaj korespondantoj. Samtempe la administracio de Monda Kulturo atentigas, ke pro la ŝanĝo de redaktoro la vintra kajero, al kiu kontribuas Baghy, Gregor, Kalocsay, Rossetti, Vatré, Waringhien kaj aliaj konataj talentoj, aperos en februaro anstataŭ januaro. Libro-premioj atendas tiujn, kiuj varbos novajn abonantojn! Jarabono: 15 gld. (60 st).

AŬSTRALIA ĈAMBRO DONACOTA. Ankoraŭ unu asocio, la aŭstralia, decidis per simbola "aĉeto" de unu ĉambro en la Centra Oficejo en Rotterdam kontribui al la fortikigo de UEA! Jam nun pli ol 2000 gld. estas kolektitaj inter aŭstraliaj Esperantistoj por tiu celo. Al ĉiuj kontribuantoj niajn plej sincerajn dankojn!

PETU PROSPEKTON PRI



ĈE I.T.C. - GEB. 114
SCHIPHOL NEDERLAND



LA INTERNACIA AFIŜO

Kvarkolora
Moderna
Kun taŭga
blanka spaco
por naci-
lingva
teksto

Prezoj:

Formato 1 ekz. 0.20 gld. (0.80 steloj)

41,5 × 59 cm: 100 ekz. 18.— gld. (72.— steloj)

1000 ekz. 165.— gld. (660.— steloj)


Formato 1 ekz. 0.40 gld. (1.60 steloj)

58,8 × 83,2 cm: 100 ekz. 36.— gld. (144.— steloj)

1000 ekz. 330.— gld. (1320.— steloj)

Tuj mendu ĝin ĉe la Centra Oficejo

ORIENTO KAJ OKCIDENTO



Ilustraĵo el "Oriento kaj Okcidento"
(Foto: UNESCO - Marc Riboud).

de
Georges
Fradier

Eldonis
UEA
kun
helpo
de
Unesko

1,50 gld
(6 st.)
50 paĝoj

Antaŭ 400 jaroj, je la 14-a de februaro, naskiĝis GALILEO GALILEI, unu el la plej grandaj personecoj en la historio de la eŭropa scienco, homo persekutita pro tio, ke li eldiris veron kontraŭan al la ĝenerala opinio tiutempa. En la nuna jaro la nomo de Galileo estas proponita de la argentina delegacio al Unesko por honora memorigo tra la tuta mondo. La verko de Bento de Jesus Caraça, tradukita en Esperanton, (62 p., 196 × 133 mm.) rakontas la dramon de lia kondamniĝo kaj reliefigas la sciencan valoron de liaj eltrovoj.

Prezo: 1,70 gld. (6,8 st). Mendu tuj ĉe UEA.

BENTO DE JESUS CARAÇA

1564
1642



GALILEO
GALILEI




PORTUGALA ELDONA RONDO


Sono

Sono estas io forflugema; vibrado disvastiganta, kelkfoje formortanta antaŭ ol atingi aŭskulteman orelon. Kaj denove elektroniko helpas al la homo per teknikoj ebligantaj al la sonvibrado transportiĝi ĉien, aŭdiĝi ĉie. En oficejoj kaj hospitaloj, uzinoj kaj kantinoj, ŝipkonstruejoj kaj sportaj centroj, aerodromoj kaj stacidomoj, sonamplifado ne povas manki. Philips alvok-sistemoj, laŭtparol-instalaĵoj kaj alia elektro-akustika aparataro profitas de profunda scienca esplorado kaj longjara sperto.


Afrika Halo
Samtempa traduksistemo
Addis Abeba - Etiopio



Federacia lernejo por surduloj
Aŭdohelpiloj
Penang - Malaĵaj Ŝtatoj



Centra Vagonara Stacidomo
Alvok-sistemo
Meksiko Urbo - Meksikio



PHILIPS por produktoj kiuj daŭras!